REGO

☆ RUSIA ESPERANTO-GAZETO ☆

komuna eldono de REU kaj REJM *№ 1 (20) februaro 2004*



Mikaelo Bronŝtejn

estas dum lastaj jardekoj unu el ĉefaj figuroj en E-vivo de nia lando (kaj ne nur)
vi trovos en ĉi numero lian rakonton pri turneo en Nordio kaj 2 novajn versaĵojn
baldaŭ aperos lia nova romano
en julio li festos sian 55-jariĝon

en la numero

memore al E.A.Bokarev
raporto de la Estraro de REU
IJK en Kovrov, ĝiaj Antaŭ- kaj Postkongresoj
rakontoj pri jubilea IF, dediĉita al Rusio
invito al Printempo en Uralo
BET kaj aliaj novaĵoj el Litovio
tradukkolekto de Mikaelo Povorin
"Bulteno de REU" kaj "REJM-info"
novaĵoj, anekdotoj kaj multo alia

Moskvo, 2004

MEMORE AL E.A.BOKAREV

Ni longe iris paralele,
Sub Esperanto-stel' ĉiame,
La lingvo sonis tiel bele,
Ke vi kolektis vortojn ame.

Kaj poiome, vort' post vorto,
Kiel abelo la nektaron,
Dank' al fervoro kaj rokforto
Valoran kreis vi vortaron.

Ne nur per vorto, sed per faro
Batalis, plena de la kredo,
Vi por feliĉo de l' homaro,
Por homaj rajtoj sur planedo.

Gvidanta estis via rolo
En la kulturaj interligoj
Por paco, amikec' popola,
Kontraŭ militaj fi-instigoj.

Nun sur la tabl' ripozas plumo,
Kaj nova nefinita libro...
En kiu – la anima lumo
Kaj ĉiu eta kora vibro...

La homoj en la viv' – nur gastoj,
Sed ni forgesas pri la fino...
Kaj tamen venas ĉiam hasta,
Vestita nigre oldulino...

Forpasas niaj veteranoj,
Sin dediĉintaj de la juno
Al ideal' de l' mondlingvanoj,
Al granda temo de la nuno.

Revenos baldaŭ gruoj ree, –
La viv' jubilos en ripeto.
Sed vi ne venos... Plenobee
Kuŝanta en la urno eta.

Al vi, amik' de Esperanto,
Al vi, kreinto de l' vortaro,
Al vi, porpaca batalanto, –
Adiaŭ, – diras l' amikaro...


РУССКО-
ЭСПЕРАНТСКИЙ
СЛОВАРЬ

Около 24 000 слов

Составили
доктор филол. наук Е. А. БОКАРЕВ, Я. В. ВОЛЕВИЧ,
канд. филол. наук В. П. ГРИГОРЬЕВ, К. М. ГУСЕВ,
И. В. СЕРГЕЕВ, канд. филол. наук А. В. СУПЕРАНСКАЯ, И. Б. ХОВЕС

под редакцией
Е. А. БОКАРЕВА

ИЗДАТЕЛЬСТВО «СОВЕТСКАЯ ЭНЦИКЛОПЕДИЯ»
МОСКВА — 1966


ESPERANTA-RUSA
VORTARO

Preskaŭ 26000 vortoj

Kompilis
doktoro de filologiaj sciencoj
E. A. BOKAREV

Kun aldono de mallonga gramatika skizo de esperanto

ELDONEJO «SOVETA ENCIKLOPEDIO»
MOSKVO — 1974

Aleksandr Logvin
Moskvo, 12.03.1971
(publikigita en "der esperantist", № 47, majo-junio 1971)

FLAGPORTANTO DE RENASKIĜO

okaze de la 100-jara jubileo



Jam kelkaj generacioj de nialandaj esperantistoj aktive uzas la rus-Esperantan kaj Esperanto-rusan vortarojn, kiujn redaktis kaj kompilis eminenta esperantisto, akademiano Jevgenij Aleksejeviĉ Bokarjov (mi preferas la transskribon Bokarjov, kiu pli adekvate transdonas la rusan formon *Бокарёв*). La vortaroj iĝis klasikaj kaj estas inda monumento por ilia aŭtoro. Tamen lia E-agado estis multe pli varia.

Eŭgeno Bokarjov naskiĝis la 25-an de februaro 1904 en la familio de vilaĝa instruisto. La gepatroj loĝis en Dagestano, do estas tute nature, ke li iĝis renoma fakulo pri nordkaŭkaziaj lingvoj, doktoro de filologiaj sciencoj. Sed eble ankaŭ la fama dagestana multlingveco, ĉe kiu loĝantoj de najbaraj vilaĝetoj parolis malsamajn lingvojn, igis lin frue pensi pri la problemoj de komunikado inter diverslingvuloj. Jam en la 14-jara aĝo Eŭgeno komencis okupiĝi pri Esperanto kaj restis konvinkita esperantisto ĝis la lasta spiro.

Fininte la lernejon, li studentiĝis en la lingvistika fakultato de Rostova universitato. Tie la juna Eŭgeno rimarkeble aktivis, gvidante plurajn E-rondetojn kaj eldonante murgazetojn. Li estis delegito de la 2-a (1925) kaj 3-a (1926) Kongresoj de SEU, poste membro de ties Centra Komitato. Kiel profesia lingvisto, Bokarjov partoprenis polemikon en la revuo "Izvestija C.K. SESR", kuraĝe oponante la aŭtoritatan ideologon de SEU E.Spiridoviĉ.

La reprezaliojn kontraŭ esperantistoj li bonŝance evtis. Fininte la universitaton, li laboris en Norda Kaŭkazio, poste en Leningrado. Kiam komenciĝis la milito, Eŭgeno Bokarjov aliĝis kiel volontulo al defendantoj de Leningrado dum la blokado. Tie li estis grave vundita kaj enhospitaligita. Post la resaniĝo Bokarjov rajtis reveni al la scienca laboro, sed preferis daŭrigi la militservadon. Post la milito li revenis en Leningradon en rango de majoro, kun multaj ordenoj kaj medaloj. Ekde 1953 Jevgenij Aleksejeviĉ eklaboris en Moskvo, en la Instituto de lingvoscienco, kie ĝis sia morto li estris la sektoron de kaŭkaziaj lingvoj.

Kiam meze de la 50-aj jaroj reaperis ebleco de E-agado, Bokarjov iĝis centra figuro de la renaskiĝaj procezoj. Li estis inter la unuaj, restarigintaj kontaktojn kun eksterlandaj esperantistoj. En 1956 profesoro Bokarjov publikigis (kun O.S.Aĥmanova) brilan studon "Internacia helpa lingvo kiel lingvistika problemo" en la plej grava landa fakrevuo "Voprosi jazikoznanija"; en sia instituto li organizis sciencan sesion pri la problemo de internacia lingvo. Samjare estis provo restarigi SEU, la refonda kunveno elektis Eŭgenon Bokarjov kiel prezidanton. Sed la provon fiaskigis oficialaj instancoj, Jevgenij Aleksejeviĉ ricevis partian riproĉon.

Tamen li ne mallevis la manojn kaj daŭrigis la E-aktivadon. En 1957, prepare al la tutmonda junulara festivalo en Moskvo, li iniciatis organizon de E-rondeto, tiel kontribuante al apero de la unua postpaŭza E-generacio. En 1959 profesoro Bokarjov aktive partoprenis celebradon de la 100-jara jubileo de Zamenhof, en "Memorlibro pri la Zamenhof-jaro" aperis lia artikolo "Esperanto, la lingva kreaĵo de Zamenhof".

En la sama tempo Jevgenij Aleksejeviĉ kaj aliaj veteranoj insiste klopodis pri atribuo de iaj oficialaj kadroj al la reviviĝanta kaj vastiĝanta E-movado. Rezulte de leteroj kaj vizitoj al oficialuloj aperis paliativa solvo: en 1962 ĉe Unio de societoj de amikeco kun eksterlando estis kreita la Komisiono pri internaciaj ligoj de sovetiaj esperantistoj. Prezidanto de la Komisiono iĝis profesoro Bokarjov, sur tiu posteno li restis ĝis la vivofino. La Komisiono ludis tiutempe gravan rolon en renaskiĝo de internaciaj kontaktoj kaj en reapero de E-eldonaĵoj. Speciale menciindas la almanako "Por la paco" kaj sovetiaj numeroj de "Paco", inter kies kontribuaĵoj ne mankis tiuj de Bokarjov mem. En la 48-a UK en Sofio (1963) li gvidis grandan grupon de sovetiaj esperantistoj, kiu signis revenon de sovetianoj sur la mondan E-arenon. Poste li gvidis delegitarojn al UK-oj en Hago (1964), Budapeŝto (1966) kaj Vieno (1970). Liaj dumkongresaj sciencaj prelegoj ĉiam altiris grandan atenton. En 1963 profesoro Bokarjov estis elektita kiel membro de la Akademio de Esperanto.

Laŭ iniciato de Jevgenij Aleksejeviĉ en la Instituto de lingvoscienco fondiĝis kaj sub lia gvido sukcese funkciis sekcio de interlingvistiko, dum kies kunsidoj oni science diskutis esperantologiajn problemojn kaj kritike taksis novajn planlingvajn projektojn. La konvinko de Bokarjov pri supereco de Esperanto kompare kun ĝiaj rivaloj estis ne spekulativa, sed bazita sur konkreta scio: li praktike scipovis aliajn planlingvojn – Volapük, Ido, Occidental, Interlingua.

Li konstante defendis Esperanton en sciencaj rondoj kaj antaŭ vasta publiko. En 1968 aperis la libro de E.Svadost "Kiel ekestos universala lingvo?" – studo grava interlingvistike, sed kontraŭ-Esperanta. Profesoro Bokarjov, estante respondeca redaktoro de la libro, sukcesis mildigi plurajn tro akrajn vortumojn de la aŭtoro, kaj la ĝeneralan malkonsenton kun ties pozicio esprimis en la redaktora antaŭparolo. Samjare en "Literaturnaja gazeta" li publikigis (kun akademiano A.Berg kaj profesoro D.Armand) artikolon "64 lingvoj... kaj ankoraŭ unu" kun pledo por uzo de neŭtrala planlingvo en la sfero de scienc-teknika informado.

Malgraŭ sia streĉa okupateco, la profesoro regule partoprenis kunvenojn de Moskva Internacia E-klubo, volonte prelegis pri esperantologiaj temoj aŭ rakontis pri vizititaj de li E-aranĝoj eksterlande. Li estis homo ege modesta, helpopreta, kreanta ĉirkaŭ si etoson de trankvila laboremo. Estante la plej altranga esperantisto de la lando, Jevgenij Aleksejeviĉ neniam kriis aŭ orgojlis, tio kontraŭus lian internan delikatecon. Estimo de la esperantistaro al li estis profunda kaj reciproka.

La 11-an de marto 1971 pro subita koratako Jevgenij Aleksejeviĉ Bokarjov mortis – kiel vera esperantisto, ĉe la skribotablo, pridiskutante kun eldoneja redaktoro lastajn korektojn en la Esperanto-rusa vortaro. Tio estis legendeca morto – enviinda fino de la glora vivo.

Viktor Aroloviĉ (Moskvo)

LA NORDIA VINTRO

La preteksto

En 2002 mi feriis januare. Ankaŭ en 2003. Estas tute facile konvinki la ĉefon de la firmao, ĉar neniu oficisto pretendas pri januaro. Sekve mi estis la unua en la feria kalendaro, kaj tion oni akceptis sen miro. Tamen, kiam en februaro 2003 mi ekpretendis esti la unua ankaŭ por 2004, la ĉefo esprimis mireton. "Vi povas argumenti, certe, ke vi ne ŝatas varman bieron kaj ŝvitajn virinojn, – li diris, – sed estas ankaŭ pli serioza kaŭzo, ĉu ne?" "Jes, – mi respondis. – Esperanto." Kaj la temo estis elĉerpita. Efektive, mia ĉefo estas persono moderna.

En 2002 mi turneis en Germanio. En 2003 – en Francio. Estis bona preteksto provi por 2004 Nordion. La Internacia Festivalo (IF), kiun mi kutime partoprenas dum jarŝanĝo, devis okazi ĉi-foje en Kiel, urbo pli-malpli proksima al tiu mondregiono. Mi arogis peti helpon de HDP (Hans-Dieter Platz, la organizanto de IF), kaj tiu faris minproponon al la svedoj kaj finnoj. Kun sincera dankemo mi raportu, ke ili konsentis. Estis surprizo por mi, ĉar mi opiniis miajn kantojn, certagrade diboĉajn, kaj la saman konduton taŭga por pli sudaj, pli varmaj gentoj. Estis eĉ pli grava surprizo, kiam libervole anoncis sin ankaŭ Danlando. Kaj estis sufiĉe granda timo. Unuavice pri la komprenemo kaj perceptemo de la nordiaj aŭskultontoj – ja laŭplane ili devus esti plejparte neesperantistoj, eĉ pli – junularo! Duavice mi sentis antaŭtimon pro la kalendaro de mia turneo – pli-malpli libera en la komenco kaj tute streĉa poste. Vizitis min eĉ troa hezitemo kune kun la deziro retiriĝi, rezigni la planon. Sed la organiza rado jam ekfunkciis, pluraj urboj anoncis sian deziron akcepti min... Ĉiujn hezitojn kaj timojn, do, mi devis forĵeti en rubujon kaj akcepti tion, kion donos la kaprica damo – Destino.

Haste laŭ la mapo

La ekiro estis ne bona. La neĝoŝtormo, furiozinta matene, la 25-an de decembro, kaŭzis enorman kvanton de paneoj kaj akcidentoj en la ŝoseo Tiĥvin – Peterburgo. Ankaŭ la aŭto de mia amiko, portanta min, ne evitis tion. Nenio terura tamen okazis – nur kurta ektimo kaj duonhora atendo en la sendifekte renversita aŭto, kiu tamen kaŭzis mian malfruiĝon al la buso, foririnta Germanion sen mi. Nu, la komplezema busfirmao trovis por mi lokon en la sekvataga buso, kaj per tio finiĝis la kapricoj de mia Destino. La tuta komplika itinero inter Peterburgo kaj Pe-

terburgo pasis senprobleme, dank' al zorgoj de multaj homoj. Ĉu iu volas sekvi miajn zigzagojn sur la mapo? Bonvolu: Peterburgo – Berlino – Kiel – Travemuende – Trelleborg – Gotenburgo – Helsingborg – Malmö – Kopenhago – Malmö – Västerås – Stokholmo – Turku – Rauma – Keuruu – Tampere – Lempäälä – Kimito – Helsinki – Lahti – Lappeenranta – Peterburgo. Kvardek ses horojn perbuse – ĝis Berlino. La eventoriĉa semajno de la IF en Kiel. Kaj poste mem la turneo – inter la 5-a kaj la 31-a de januaro. Nun, post semajna hejma ripozo, forvaporiĝis tiu postturnea elĉerpiĝo; restis nur la fiera certeco pri la propra organismo, kiu dume ne protestas kontraŭ similaj aventuroj.

"Saluton, gento juna, nekonata!"

En citiloj, ĉar diris ne mi, sed Aleksandr Puŝkin antaŭ du jarcentoj. Tamen enanime mi ripetis tiun frazon ĉiufoje, irante kun timo al la prezentadoj por eksterespa publiko, por junularo. Kaj tiuj ja multis, ĉiam provokante antaŭtimon, kompensatan per la kontento okaze de la evidenta sukceso. Sumigante la kvantojn de gejunuloj, kiuj aŭdis miajn rakontojn pri Rusio, pri Esperanto, pri mi mem en lernejoj, gimnazioj, altlernejoj kaj bibliotekoj de diversaj urboj, adiciante ne tro junaĝajn aŭskultantojn, i.a. en la maljunulejo de Lempäälä (tre ĉarma kvindeko da geavoj!), mi venas al proksimuma kvanto de ĉ. 750 – 800 personoj. Se almenaŭ dekono el inter ili eklernos Esperanton – jam estos bona rezulto!

Ĉiuloke venadis multaj demandoj diverstemaj, foje igantaj min skrapi la nukon embarase. La aŭskultantojn interesis la rusia vivo, la rusa kulturo, la vastiĝo de Esperanto en la reto, la enesto de langorompaj frazoj en Esperanto. Mi devis tuj elpensi tiujn por pravigi la jesan respondon!

Mi eĉ ne povis imagi, ke en Skandinavio regas tioma estimo, amo, adoro al bardo esence plej rusa, al Vladimir Visockij – sed ja efektive ekzistas tiu fenomeno! Post prezentado de Visockij-kantoj en unu el la aŭditorioj okazis diskuto eĉ kun interkvereleto pri la kvalito de finnlingvaj tradukoj el Visockij. Dum la dekminuta diskuta ardo mi estis komplete forgesita kaj nur mire gapis al la evento...

La plej neatendita demando venis en iu finna gimnazio. Fraŭlino el la dudeko da gejunuloj petis, ke mi kantu la rusian himnon. Estis granda embaraso por mi, ĉar la nuntempa himno de Rusia Federacio havas la melodion de iama Sovetia himno, kaj mian kapon ja estas enmartelitaj la

vortoj ĝuste de tiu Sovetia, ne de la Rusia! Mi klarigis tion al la aŭskultantoj, sed ili estis pretaj aŭdi eĉ la Sovetian, do mi kantis... Reciproke, la geknaboj ekstaris, metis la dekstrajn manojn sur la brustojn kaj kantis por mi la himnon de Finnlando. "Ha, mi aŭdis tiun ĉi melodion, – mi diris. – Ŝajnas, ke post iu grava venko de la finna glacihokea teamo..." "Nia finna teamo estas la plej forta en la mondo!" – kriis kelkaj knaboj. "Permesu al mi resti ĉe iom alia opinio." – mi petis, kaj ili permesis...

Miaj inspirantoj

Estis, certe, esperantistoj, kiuj dum la tuta itinero subtenis min ne nur per varmo de la animoj, sed ankaŭ per refreŝiga duŝo aŭ eĉ saŭno, per komforta lito, per bongusta manĝo k.t.p. Vizitinte (sen paroli pri la IF kun ties ĉ. 200 partoprenantoj el 22 landoj!) dek du kunvenojn de lokaj Esperanto-grupoj, kluboj kaj asocioj, mi trovis kelkcentan kompreneman kaj bonkoran publikon, kiu laŭesence estas mia publiko, la verda popolo, por kiu mi verkas kaj kantas. Tie, en la kunvenoj tute mankis timo, sed estis deziro montri al miaj karaj geaŭskultantoj la plejbonon el tio, kion mi produktis dum la lastaj jaroj. En la esperantistaj kunvenoj mi salutis la malnovajn geamikojn kaj akiris amason da novaj. Kelkajn klubojn mi jam estis vizitinta antaŭ dek jaroj, en 1994. Komparante la malnovajn fotojn en la klubaj albumoj kun la nuna realo, mi konstatis kun sopireto, ke la koloro de mia barbo katastrofe rapidas de la bruna al la blanka, kaj ke ankaŭ miaj geamikoj akiris kelkajn sulkojn... La tempo flugas sen lasi nin junaj...

Esperantistoj en multaj urboj estis inspirantoj ankaŭ de mia prezentado pere de lokaj amaskomunikiloj. En Västerås la aŭto de loka radio venis al la domo, kie loĝas Wim Posthuma por aranĝi rektan radioelsendon. Pri la sukcesa poramasa koncerto, organizita de Wim en la urba koncertejo (partoprenis Duo Diverslingve, Olesja Bertse, Kaj Stridell kaj mi) aperis kelkaj anoncoj kaj granda artikolo en loka ĵurnalo. Grandaj kaj bonkvalitaj artikoloj aperis ankaŭ en Rauma kaj en Kimito. Notindas, ke la artikoloj estis publikigitaj en la paĝo pri kultura vivo kaj anstataŭ truda propagando prezentis rakonton pri la persono, kiu vivas kaj verkas ĉefe en Esperanto-medio.

Mi tutkore dankas miajn afablajn gastigantojn – HDP, Ralf, Ann-Louise, Asta, Iliana, Wim, Nataŝa, Ĵomart, Tiina, Paula, Seja, Sylvia, Carola, Taneli, Marti kaj Jorma. Sed mi estus tute maljusta, se mi forgesus diri mian tutkoran dankon ankaŭ al la edzoj/edzinoj de la nomitaj miaj geamikoj, al la aro da amikoj/amikinoj, kiuj mian nemultan liberan tempon faris rava travivaĵo per ekskursoj kaj promenoj, per agrablaj konversacioj ĉe manĝotablo, kiuj sincere aplaŭdis dum miaj koncertoj. Refoje – koran dankon al ĉiuj!

En iu gimnazia klaso simpatia fraŭlinjo faris al mi la plej komplikan demandon: ŝi petis mian opinion pri la senco de mia vivo. Al la legantoj mi diru veron, ke mi ne scias la respondon. Tamen al la fraŭlinjo mi respondis ion tre proksiman al mia ebla opinio. Mi diris, ke mi volas esti komprenita de homoj.

Ŝajnas al mi, ke almenaŭ dum la Nordia turneo mia vivocelo efektiviĝis.

Mikaelo Bronŝtejn (Tiĥvin), 07.02.2004

ESPERANTISTA PRINTEMPO EN URALO

La 01-03-an de majo 2004 okazos regiona renkontiĝo "Esperantista Printempo en Uralo". Ni invitas ĉiujn esperantistojn el Okcidenta Siberio, Uralo kaj Volgio veni al ni por kune ĝui agrablan etoson de esperantista renkontiĝo, konatiĝi kun unikaj vidindaĵoj de Jekaterinburg kaj ĝia interesa historio.

La renkontiĝo pasos en la ripozejo "Bodrostj", kiu situas rande de la urbo en pitoreska loko kun pina arbarparko; ĝi atingeblas de la fervoja stacidomo dum 30 minutoj per urba trafiko. La kostoj: loĝado + manĝado por unu diurno – 300 rubloj. Do, entute 600 rubloj por loĝado kaj manĝado dum la tuta aranĝo. Kontraŭ tiu sumo oni loĝos en komfortaj trilitaj ĉambroj kun duŝo kaj necesejo. Por la aranĝo ni havos la tutan etaĝon kaj grandan salonon por niaj aferoj kun tabulo kaj piano!

Estas planataj minimume du ekskursoj: unu tra la urbo, tre interesa, plej verŝajne en Esperanto. La dua – al la loko, kie oni entombigis la familion de la lasta rusia caro Nikolao la 2-a; unue ni vizitos grandan katedralon, ĵus konstruitan sur la loko de pafmortigo de Romanov-oj, poste – tiel nomatan "Ganina jama", kiu situas en arbaro, kaj kie oni jam konstruis 7 lignajn ĉerkojn, por ĉiu mortpafito aparte. Krom tio ni planas viziti mineralan muzeon de Mina Akademio kaj muzeon de "Juvelista kaj ŝtonprilabora arto".

Pliajn informojn petu ĉe la organizantoj rete <komencanto@r66.ru>, aŭ telefone: (3432) 238940 – Vladimir Terjoĥin, (3432) 114250 – Viktor Kudrjavcev.

RET-04

Kiel vi jam scias, ĉi-jare la tradiciaj Rusiaj Esperanto-Tagoj (RET-04) okazos en Tiĥvin de la 14-a ĝis la 22-a de aŭgusto. La tiĥvinanoj jam trovis tre belan kaj oportunan bazejon por la aranĝo. Ĝi situas 5 kilometrojn for de la urbocentro, ĉe bela bordo de pura rivero Tiĥvinka. La prezoj por loĝado (70-120 rubloj por tagnokto) kaj manĝado (ĉ. 100 rubloj por trifoja manĝo dumtage) estas tre moderaj; eblos loĝi en tendoj, funkcios bufedejo. Vin atendas varia kaj eventoriĉa programo: interesaj prelegoj kaj diskutoj, ludoj kaj konkursoj, vespera distro kaj nokta fajro, ekskursoj, fiŝkaptado, boatado, berkolektado… Nuntempe okazas traktado pri la partopreno en RET-04 de Ĵomart kaj Nataŝa kaj de Nataŝa kaj Andrej Berce. Plej verŝajne iu el tiuj brilaj kaj ŝatataj duopoj (eble eĉ ambaŭ) venos por ĝojigi nin per siaj kantoj. Pliajn informojn, aliĝkotizojn kaj aliĝilojn vi trovos en la 1-a Informilo, kiu estas dissendata kune kun tiu ĉi numero de REGo.

RET-oj komenciĝis en Jelec en la fora jaro 1989

RUSIO – NE NUR POR RUSOJ

Traleginte ĉi titolon, ĉu vi samopinios? Verŝajne, jes. Kaj vi pravos, ne nur pro tio, ke en Rusio vivas entute pli ol 100 etnoj kaj nur 80% de la loĝantaro estas rusoj, sed ankaŭ pro la kialo, ke la pasinta Internacia Festivalo (IF) estis dediĉita al Rusio. Malproksima norda urbo Kiel en Germanio ĉe la fjordo de la Balta maro kunvenigis en junulargastejo ĉirkaŭ 200 personojn el 22 landoj kaj 3 kontinentoj. En tute senfrosta vetero (+8 – +10 gradoj), kompreneble senneĝa kaj iom, bedaŭrinde, pluvoza, la partoprenantoj de IF konatiĝis kun Rusio, "nekonata por multaj, sed kara hejmlando por enloĝantoj" (laŭ vortoj de Hans-Dieter Platz, senlaca kaj zorgema organizanto de IF-oj).

Ni, rusianoj, provis laŭeble plene prezenti nian landon dum la prelegoj kaj koncertoj: la historion (ne ĉiam gloran), la lingvon (tre komplikan, sed belsonan), la kulturon (riĉan kaj multfacetan). Inter la plej allogaj programeroj estis t.n. "Ronda Tablo", dum kiu 5 rusianoj de 5 etnoj respondis al diversaj demandoj de partoprenantoj. Du horoj ne sufiĉis por pridiskuti ĉion, kio interesis la IF-anojn. La konversacioj daŭris en Knajpo ĉe glaso da "Baltika", rusa biero, aŭ limonado, speciale venigitaj al la trinkejo. Same tie ofte sonis gitaroj, kiuj akompanis la kantadon de E.Puĥova, O.Zvereva, M.Bronŝtejn, V.Malenko, Ĵ.Amzejev kaj N.Gerlaĥ. Tamen ne nur rusianoj prilumis la temon de la fama jarfina E-aranĝo – multaj aliaj partoprenintoj kontribuis al la programo per diversaj interesaj prelegoj: B.Rozenfelde el Latvio kaj A.Ionesov el Uzbekio, C.Knabe el Germanio kaj K.Tytgat el Belgio, T.Phoenix el Usono kaj A.Grossmann el Francio, k.a.

majesta polonezo

La libroŝatantoj povis foliumi kaj poste aĉeti la elektitajn librojn en la libroservo de Flandra E-Ligo, kiu jam de multaj jaroj venigas E-literaturon kaj diversajn esperantaĵojn al IF. Abundis ankaŭ distraj programeroj: danc-kursoj kaj tablotenisa turniro, societaj ludoj kaj kelkaj promenoj-ekskursoj tra la urbo (la vigla ĉiĉerono – C.Darbellay). Apartan mencion meritas la tuttaga ekskurso al Lübeck, unu el la plej belaj nordgermanaj urboj, la "reĝino de la Hanso" (la majstra ĉiĉerono – W.Bormann). La famaj vidindaĵoj alternis kun la vilaĝecaj stratetoj, la marcipana muzeo – kun la paradiza vendejo kun ĉirkaŭ 300 marcipanaj kreaĵoj.

La pinto de IF estas Silvestra balo. Necesas mencii, ke ĉi E-forumo estis jubilea, do ĉiuj per aplaŭdoj salutis la plej oftajn partoprenintojn de la tradicia Novjara aranĝo. La balo komenciĝis per pli multnombra, ol pasintjare, "multnacia karavano" de paroj, kiuj anticipe lernis, iam ŝvite, sed diligente kaj insiste, la paŝojn de majesta polonezo sub gvido de D.Leyk. Per ĉampano kaj ĝojaj bondeziroj ni bonvenigis la Novan Jaron! Tion ni faris multfoje, ĉar la ĉeestantaro reprezentis kelkajn horzonojn. Tamen, la balo finiĝis… kaj post du tagoj ankaŭ la Festivalo. Dezirantoj iom konatiĝi kun Svedio, la lando de la 88-a UK, ĝuis la plilongigan tagon kun speciala programo kaj fama "sveda tablo".

Post la reveno en neĝan Rusion restas en la memoro la neforgeseblaj tagoj, pasigitaj en la malproksima Kiel, ĝia varma etoso, kiun ne malbonigis oftaj pluvoj kaj iom laciga kelktaga trajnvojaĝo. Ĉu vi dezirus sperti IF-on? Kaj denove reveni al ĉarma E-renkontiĝo? Magdeburg invitas vin!

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

IF-20

Oni petis min verki artikolon pri nia vizito al IF-20 en la urbo Kiel. Brunŝtono petis – ne eblas rifuzi! Do, mi provas...

Kion mi sciis pri IF antaŭ unu jaro? Preskaŭ nenion! Nur aŭdis, ke ĝin foje vizitas kelkaj jam ne junaj rusiaj samideanoj kaj al ili sufiĉe plaĉas tio. Poste mi legis impresplenan artikolon de Bronŝtejn en REGo. Inda aranĝo ŝajnas esti tiu IF, pensis mi. Etosplena, programriĉa... Kaj pri iu mistera Knajpo temis, kiel pri io ne por infanoj. El Mikaela artikolo mi ne ĝuste komprenis, kio tamen estas Knajpo, nur komprenis ke oni tie verŝas, kiel ni diras en Rusio...

Kaj printempe trafis min onidiroj, ke germanaj kaj rusiaj organizantoj planas inviti kelkajn anojn de la teamo "Oraj kantoj" por partopreni en la sekva IF-20. Onidiroj rezultiĝis je telefonvoko aŭ letero de Mikaelo, kie li vere proponis al mi aktive partopreni en IF kun tre favoraj kondiĉoj. Kial do rifuzi tiun raran kaj agrablan proponon? Kaj al kiu rifuzi, al Mikaelo!? Do, mi konsentis.

Dum la jaro okazis, ke la konsisto de nia Orakanta ensemblo iom ŝanĝiĝas. Iu persono naskis infanon, alia intencis naski. Al la decembro ni venis kun 5 anoj de la ensemblo plus kelkaj familianoj kaj amikoj. Tamen ni proponas, sed la germana ambasado en Moskvo disponas: al duono oni simple ne donis vizojn. Rezulte el la teamo restis nur tri homoj: Oksana Zvereva, Mikaelo

Vitalik Malenko kaj Nadja Ĥaritonova

Bronŝtejn kaj mi. Pro tio ni devis koncerti ne nur kiel ensemblo “Oraj Kantoj”, sed ankaŭ dise.

IF-urbon Kiel ni trafis relative facile, kvankam kiam ni serĉis IF-ejon nia angla lingvo ne helpis: lokanoj ne scipovis paroli ĝin, do montris per fingroj. Bela urbo estas tiu Kiel: golfo, ŝipoj, mevoj...

La aranĝon mem mi rigardis tra okulvitroj de IJK-60, kiun mi kunordigos en ĉi julio apud Kovrov. Kaj certe iom enviis. Ja neniam ni en Rusio havos tiom oportunajn ejojn (kaj halojn kaj loĝĉambrojn), neniam tian manĝelekton. Kiam eksterlandanoj venos al IJK kaj demandos min, kial oni ne proponas fromaĝon kaj kafon por matenmanĝo, kion mi respondu? – jen kiel mi pensis rigardante ĉion ĉi. Sed riĉa estis ne nur la menuo, sed ankaŭ programo de la aranĝo. Preskaŭ ĉiam okazis iuj paralelaj prelegoj, kursoj. Kvankam abundis inter ili diversaj paŭzoj, por ke homo sukcesu kun plezuro trinki kafon babilante kun amikoj. Eble dank’ al tiuj paŭzoj, aŭ dank’ al konscienco de programer-gvidantoj ĉio komenciĝis ĝustatempe kaj eĉ dekminutaj prokrastoj mirigis la publikon. Ankaŭ nekutime por mi estas, kiam sufiĉe grandan aranĝon organizas sola persono – HDP (Hans-Dieter Platz). Faras li tion jam dum pluraj jaroj sen iu teamo, sed kun sukceso!

en la fama Knajpo

Iom pri la koncertoj: ili estis ĉiuvespere. En la unua koncerto kantis Oksana Zvereva kaj mi. Verdire ni ne estas konata duopo en Esperantujo, sed kanti ni scipovas – do faras ni tion malofte, kaj ĉiujn niajn fortojn kaj emociojn ni donacis al la publiko persiste. Neniu ekdormis, kaj ŝajne eĉ neniu foriris – jam estas sukceso. Sekva koncerto estis de Elena Puĥova kaj Mikaelo Bronŝtejn (ankaŭ nekutima por mi duopo). Dum la tria ni prezentis “Orajn Kantojn”. Ni estis kvar menciitaj supre, kaj certe nia kantado ne similis tiun de niaj diskoj, tamen homoj aplaŭdis al ni kaj aĉetis la diskojn. Kvara koncerto estis de Ĵomart kaj Nataŝa, kaj la kvina – Internacia: ĉiuj montras siajn talentojn kaj ĝojas.

Kaj fine pri Knajpo (ja mi tie multe laboris kun mia koramikino Nadja)! Por tiuj, kiuj ne partoprenis en IF, mi klarigas: Knajpo estas drinkejo kun riĉa elekto de drinkaĵoj, trinkaĵoj kaj manĝaĵoj. Ajnatempe dum la tago oni povas veni kaj aĉeti ion ajn. Knajpo funkcias kiel kerno de la aranĝo, ĉar ĝuste en ĝi homoj trinkas, babilas, ludas. Kaj verdire vespere, post la koncertoj estas sola eblo partopreni la programon. Oni aĉetas bieron, vinon aŭ kafon, sidiĝas apude kaj kunkantas al iu, partoprenas iun tablan ludon (ege populara afero!) aŭ simple babilas.

Nu, kaj konsiloj por partoprenontoj: se via aĝo estas malpli ol 40, eble vi tamen

restu hejme aŭ partoprenu iun alian aranĝon, sed se pli – nepre vizitinda aranĝo estas tiu IF: mi ege rekomendas!

Sekva IF: la 21-a IF en la germana urbo Magdeburg, kadra temo "Tradicioj"; aktuala aliĝstato: 51 personoj el 11 landoj; kontaktadreso <HDP@internacia-festivalo.de>, ttt-ejo <www.internacia-festivalo.de> (tie eblas ankaŭ vidi fotojn pri la pasinta IF).

Vitalik Malenko (Ĵukovskij)

P.S. Kaj mi eĉ komencis pensi post IF: kial ni ne organizis ĝis nun ion indan por Novjaro en Rusio... Ĉu provi?

HANSO, HELA SUN', HDP...

dediĉe al la organizanto de IF

Hanso, hela sun', HDP...
En Kristnaska homa tumult'
perdas kapon mi, revemul',
des pli ĉar mi dormis ne tro...
HDP, migdala odor',
pupaj porkoj el marcipan',
kampaniloj, festa sonor',
degelanta dolĉ' en la man'.
Apoge' de l' festa komerc', –
akre arda aĉeta rit', –
daŭros ĝis novjara komenc'
la pratempa hansa spirit'.
Glitkurado, festa muzik',
HDP en strata rumor'...
Kial, mia bona amik',
nur amar' – migdala amor', –
la amare-dolĉa obsed'
premas min, paŝantan en vant'?
Mi neglektus tion ja, sed
plu aŭdiĝas voko de l' kant'.
En promena strat' kantistin'
kantas pri la frosta Rusi',
celas kompreneble, ne min,
sed komprenas, eble, nur mi.
Hanso, sun', migdala aer',
kanto en helblua senlim'...
La ĵetita distre moner'
Tintas plu en mia anim'.

Mikaelo Bronŝtejn

30.12.2003, Lübeck

RAPORTO DE LA ESTRARO DE REU

al la Konferenco pri la agado post la 15.12.2002

En la jaro 2003 estis en REU 273 membroj. El ili 180 individuaj (45 dumvivaj, 130 pagintaj la plenan kotizon por la jaro 2003, 5 familiaj) kaj 93 aligitaj pere de 8 aliĝintaj kolektivoj (kluboj). (Interesa statistiko: el 130 pagintoj de la plena kotizo 79 estis individuaj membro ankaŭ en 2002, kaj el inter la pagintoj en 2002 estis 33, kiuj ne rekotizis en 2003.) La Estraro konsistis el 10 personoj, krom ili kelkajn gravajn taskojn de la Estraro plenumis komisiitoj, formale ne estintaj membroj de la Estraro – tial ilia agado estas konsiderata en tiu ĉi raporto.

La agadon de la Estraro oni povas disdividi je kelkaj ĉefaj direktoj.

1. Renkontiĝoj

REU organizis aŭ partoprenis en organizo de kelkaj tradiciaj kaj novaj renkontiĝoj. Tio estis, laŭ la kronologia ordo: EoLA-15 (G.Kokolija), Primavero en Toboljsk (V.Kudrjavcev), RET-03 (G.Kokolija, N.Gudskov), StRIGo-9 (I.Gonĉarova, N.Gudskov, G.Kokolija), REK-23 (la Estraro). Mi ne raportos speciale pri la renkontiĝoj, ĉar ili diversflanke estis prilumitaj en REGo kaj aliaj informiloj (inkluzive la internaciajn), nur emfazos kelkajn aferojn.

1.1. Partopreno de REU en organizo de la aranĝoj kun aliaj organizoj aŭ lokaj teamoj montris sin sufiĉe fruktodona kaj, ŝajnas, aldonis al la aranĝoj pli da intereso kaj multfaceteco. Al mi ŝajnas, indas ĉiam insisti pri partopreno de REU en organizo de diversaj renkontiĝoj – tio minimume aktivigas kaj popularigas la aranĝojn kaj donas aldonajn impulsojn por la asocio.

1.2. Primavero en Toboljsk estis la unua provo post longa periodo okazigi regionan renkontiĝon. Ankaŭ la temo estis koncerna: "Regiona agado: agaddirektoj kaj perspektivoj". Certe, la unusola faro tiuspeca ne estas ankoraŭ reestablo de bona tradicio, sed ni esperu, ke tio ja okazos.

1.3. RET-03 estis la sola aranĝo, kiun REU organizis sen aliaj organizoj, kvankam estis planita helpo de REJM (kaj manko de tiu helpo iomete senteblis). La plej ĉefa afero estis, ke REU okazigis RET-on la duan fojon, ĝenerale ĝi ekplaĉis al la popolo, kaj nun jam eblas paroli, ke tiu aranĝo fariĝis tradicia, konstanta kaj grava ero de nia vivo.

1.4. Pri la mankoj. Estis planita serio de temaj seminarioj por aktivuloj de la movado. Estis precize anoncitaj dato kaj loko por la unua, pri kluba organizado. Bedaŭrinde, aliĝis nur 1 (unu!) persono krom la organizantoj, kaj ni devis nuligi la tutan planon. Do, dume aŭ niaj aktivuloj ne bezonas plialtigi sian labornivelon kaj interŝanĝi la spertojn, aŭ, eble, ni, bedaŭrinde, ne plu havas la aktivulojn.

2. Eksteraj rilatoj kaj publikaĵoj

En la kampo de eksteraj rilatoj estis du novaĵoj, daŭris ankaŭ penoj diskonigi nian agadon pere de amaskomunikiloj.

2.1. Sukcese pasis en Maĥaĉkala la konferenco "Lingvoj kaj kulturoj en la 21-a jc. Problemoj kaj perspektivoj", organizita de socia organizaĵo Inform-analiza Centro "Rakurs" (A.Junusov) kune kun Moskva Helsinka Grupo (MHG – granda socia rusia homrajta organizaĵo) kaj REU. Krom e-istoj (Gudskov, Gonĉarova, Junusov) ĝin partoprenis reprezentantoj de MHG, dagestanaj akademianoj kaj profesoroj. Rezulte – tre favora por E-o rezolucio, publikaĵoj en gazetaro.

2.2. La unuan fojon en la historio Rusia Esperantista Unio oficiale partoprenis en granda neesperantista aranĝo – Tutrusia Konferenco de sociaj organizoj (27-28.10.2003, Moskvo, Konferenca centro de la hotelo "Kosmos") kiel egalrajta civila organizo (apartaj esperantistoj, certe, renkonteblis ankaŭ en aliaj aranĝoj, sed ne kiel reprezentantoj de sia propra asocio). Plej aktive ili partoprenis en laboro kaj diskutoj de la sekcio "Civila socio kaj problemoj de migrado, repatriado kaj ksenofobio" kaj ronda tablo "Civila socio kaj defioj de tutmondiĝo". Al la menciita sekcio estis eĉ proponita kaj disdonita rezoluciproponо pri signifo de Esperanto en batalo kontraŭ ksenofobio, tamen pro manko de tempo oni ne sukcesis ĝin pridiskuti (bedaŭrinde, kiel ankaŭ kelkaj aliaj gravaj problemoj koncernaj). Estis disdonitaj ĉ. 350 kompletoj de diversaj materialoj pri Esperanto; en vestiblo dum paŭzoj konstante deĵoris iu el la esperantistoj, kiu respondis demandojn pri nia lingvo kaj movado (N.Gudskov).

2.3. Konstantaj informoj pri Esperanto (de 1 ĝis 2 paĝoj) aperadis en la gazeto "Dagestanskij rakurs" en Maĥaĉkala, ĉefredaktoro A.Junusov. Certe la eldonkvanto ne estas granda, sed la celgrupoj – dagestanaj sociaj aktivuloj kaj sociaj aktivuloj en aliaj partoj de Rusio – estas sufiĉe utilaj por disvastigo de Esperanto.

2.4. En nova granda enciklopedio "Globalistika", eldonita de la centro "Dialog" kaj eldonejo "Raduga" (26,5 cm, 1328 p., 5000 ekz.), aperis la artikolo "Esperanto" de N.Gudskov (pp.1260-1263). La eldono ekzistas paralele en la angla lingvo kaj estis preparita de la Rusia filozofia societo por la tutmonda filozofia kongreso okazinta en Istanbulo en aŭgusto 2003. Okazis aliaj publikaĵoj, i.a. decembre enkadre de "Utro na NTV"– TV-elsendo, filmita en la loĝejo de I.Gonĉarova. Ŝiaj intervjuoj aperis en "Rossijskaja naucnaja gazeta" (suplemento al "Rossijskaja gazeta") kaj aliaj gazetoj.

2.5. Bedaŭrinde, ni havis negativan sperton pri rebatoj kontraŭ malamikaj mencioj de Esperanto en gazetaro. Nek "Izvestija" (kie recenzo pri la libro "Kazaroza" de Juzefoviĉ havis provokan titolon "Esperantistoj-murdistoj") nek "Novoje vremja" (kie estis publikigita fi-delira fantaziaĵo de A.Parsĉikov pri Zamenhof kaj Esperanto) reagis niajn protestajn leterojn, nur malgranda reago de B.Kolker aperis en "Novoje vremja". Krome, estis tre komplike organizi veran kampanjon por montri amasan proteston kontraŭ tiaj publikaĵoj, kiu povus iom influi la redakciojn: malgraŭ komunaj kaj personaj alvokoj esperantistoj plejparte pigris sendi protestajn leterojn al la redakcio de "Novoje vremja".

3. Eldona agado

3.1. Regule kaj en plena ordo aperadis REGo. Ĝi vere reflektas la vivon de la landa movado kaj estas nun la ĉefa ligilo de la esperantistoj (G.Kokolija). Se oni povas pri io riproĉi la gazeton, kulpas ne la redaktoro, sed nur la movado mem (ekzemple, la lasta numero estis duobla, sed kun ordinara amplekso – nur pro nesufiĉa kvanto da materialoj en redakcia teko).

3.2. Sufiĉe operative kaj bonkvalite estis eldonita la Jarlibro (N.Gudskov, G.Kokolija, V.Aroloviĉ).

3.3. Cetere, kaj la Jarlibro kaj REGo komencis iom pli zorge ol antaŭe rilati al la historiaj eventoj kaj veteranoj de la movado: aperis la listo de memordatoj en la Jarlibro, intervjuoj kun M.Isajev kaj N.Zubkov en REGo; estis eldonita libreto de A.Logvin okaze de lia centjariĝo. Ŝajnas, ke nepras tradiciigi la aferon, ke ĝi fariĝu ĉiujara ero de niaj periodaĵoj.

3.4. Estis daŭrigata la projekto "Oraj kantoj" – aperis du novaj diskoj (G.Kokolija).

3.5. Krome, estis daŭrigata ankaŭ eldona agado de la Libroservo (J.Karcev). Aperis du novaj libroj (Kantoj sur manplato-3; A.Logvin. La lasta taglibro de l' poeto) kaj reeldonoj de la antaŭaj (Kantoj sur manplato-1, Tema vortaro).

4. Instru-metodika laboro

Tre grava sukceso estis interkonsento kun du pedagogiaj universitatoj – en Moskvo kaj Peterburgo – pri oficiala organizo de pagataj fakultativaj kursoj de Esperanto (V.Seguru). Do, kion povis fari la asocio tiurilate, ĝi faris. Sed necesas ankaŭ utiligi la aferon per fortoj de lokaj esperantistoj! Necesas, ke tiuj profesiaj instruistoj, kiuj estas, ekinstruu tie! La asocio povas ion lanĉi, sed ne efektivigi ĉion.

Se temas pri instruado de Esperanto kiel sistemo tra la lando, nenio ŝanĝiĝas pozitive. Nia samlandano Aleksandr Blinov fariĝis estrarano de ILEI, instruado de Esperanto en lia urbo daŭre bone progresas, sed eksterĉeboksare tiuj bonaj atingoj, bedaŭrinde, ne senteblas. Ne okazas iu kunordiga laboro, ne okazas seminarioj de instruistoj (vd. supre – ne aperas ies ajn intereso al ili). La sola programo tutlanda, kiu ekzistas, estas la ĈALK-ekzamenoj, sed ankaŭ pri ili intereso estas eta. Apartaj homoj instruas, jes ja, el la Estraro tion multe faras I.Gonĉarova, kiu okupiĝas ankaŭ pri perfektigo kaj reeldono de lerniloj (ŝi krome okazigis en aprilo psikologian trejnadon en E-o en Suzdalj kun Sabine Trinner kaj somere instruis en "Ora Somero" de V.Soroka kaj REJO de M.Lineckij), sed transiri al iu sistemo, iu programo de instruado diversloke ni ĝis nun ne kapablas. Tamen, ĝuste tio estas la plej grava afero por la estonto, kaj se ne aperos grupo de entuziasmuloj, kiuj vivigos la labordirekton, organizos descendojn ktp., ni restos sen bona estonto.

5. Regiona kaj interkluba agado

Pri tiu agadkampo respondecis en la Estraro V.Kudrjavcev kaj eksterestrare – G.Basov, kiuj, fakte, faris sufiĉe celkonscian laboron pri kontaktoj kun regionaj reprezentantoj, ellaboro de la enketilo por kluboj pri la aktiveco, organizis regionan renkontiĝon ktp. Bedaŭrinde, la reeĥo de la lokaj kolektivoj al la penoj de la

Estraro estis tro magra. Minimume, se ĉiuj kluboj almenaŭ iom sisteme komunikus pri siaj agadoj en la supraj kampoj (instru-metodika, eksterrilata ktp.), estus almenaŭ pli klara ĝenerala bildo de la movado en la lando kaj pli klarus, kien direkti la atenton por pli celkonscie plani la agadon. Bedaŭrinde la aktiveco por kluba kunagado ne nur landskale, sed ankaŭ regionskale, dume preskaŭ dormas.

6. Laboro de la Estraro kaj aktivularo

Mi opinias, ke ĉefaj ĉiutagaj taskoj de la Estraro (konsiderante ankaŭ la agadon de la eksterestraraj funkciuloj) kaj apartaj estraranoj estis plenumataj en ordo. Funkciis kaj eĉ stabiliĝis la Libroservo (J.Karcev), pri niaj negrandaj financoj kaj membraro konstante okupiĝis G.Kokolija kaj M.Ĉertilov, ni dece reprezentiĝis en UEA, ktp. Sufiĉe afereme la Estraro pridiskutis la rekomendojn al UEA pri la plej taŭgaj personoj por senpaga membrigo en UEA pere de Canuto-fondaĵo.

Tamen, la tutan laboron tute ne necesis fari per fortoj de tiom da estraranoj. En la asocia laboro kun certaj taskoj povas partopreni ankaŭ aktivuloj eksterestraraj, kion bone montris agado de M.Ĉertilov kaj G.Basov. Mem la Estraro, laŭ mia opinio, devas konsisti el 5, ĉiuokaze el ne pli ol 7 personoj, sed personoj facile kontakteblaj por konsistigi veran laborteamon. Alie – kiel montris laboro de la nuna Estraro – fariĝas malfacile akcepti kaj plenumi iun decidon. Mi petas la Konferencon konsideri tiun sperton kaj ne insisti pri granda kvanto de estraranoj.

Nikolao Gudskov, Prezidanto de REU

RAPORTO DE LA LIBROSERVO DE REU PRI LA 2003-A JARO

La Libroservo estas struktura departemento de REU, kiu celas vendi librojn kaj aliajn varojn, rilatajn al Esperanto. Dum 2003 ĝia agado pli stabiliĝis. Ekde tiu jaro la Libroservo komencis esti profitdona por REU – la profito estis 5 mil rubloj.

Kelkaj principoj de la agado estas jenaj:

1. Videbla stato. La operacioj estas registrataj en la datumbazo. Tio ebligas kompreni, kion havas la Libroservo – kiujn librojn, varojn, kiom da mono, ŝuldoj ktp. Eblas havi plenan multfacetan statistikon pri la aktuala stato. Precizaj rezultoj de la jaro 2003 estas finpreparataj kaj aperos antaŭ la Konferenco.

2. Plena oferto. La Libroservo estas unuiga servo por ĉiuj produktantoj kaj aĉetantoj. Ideale ĉiu povas sin turni al la Libroservo kaj ricevi tie ĉion, kion ĝenerale eblas ricevi en Esperantujo. Pri Rusi-devenaj varoj jam estis tiel, kaj nun estas evoluigata kunlaboro kun UEA kaj aliaj organizoj. En la preparata katalogo por la 2004 estos menciita ebleco mendi librojn uzante la katalogon de UEA-Libroservo laŭ la samaj kondiĉoj (sed kun pli oportuna transpago).

3. Lokaj libroservoj. Strategia vojo estas evoluigo de lokaj libroservoj. Por la homo estas pli oportune veni al sia klubo, rigardi la librojn, elekti, preni en la manojn kaj aĉeti, ol mendi nekonatan libron de la centra Libroservo. Por pli rapide starigi la sistemon, al novaj libroservoj estas donata kredito, ĉar ni ne povas esperi, ke ĵus aperinta loka libroservo tuj elaĉetos grandan kvanton da literaturo. Lokaj libroservoj devas havi minimuman sortimenton, kies listo en 2003 havis 10 titolojn.

4. Profito. Dum antaŭaj periodoj temis ne pri profito, sed pri plifirmigo kaj sta-

biliĝo de la Libroservo. Nun jam eblas ricevi profiton de la agado. En 2003 por la Libroservo estis planita profito 5 mil rublojn, kiujn ĝi efektive pagos al la kaso de REU. En 2004 la profito povas esti ne malpli ol 7 mil rubloj.

Krome, estis daŭrigata eldona agado (vd. supre en la Estrara raporto).

Jurij Karcev (Uljanovsk)

FINANCA RAPORTO POR LA PERIODO 19.12.2002 – 02.02.2004

(en rubloj, se ne estas indikita alia valuto; enkrampe estas la sumoj, planitaj en buĝeto)

ELSPEZOJ

01. Eldono de informiloj, aliĝiloj k.t.p. (5000) – 6200
02. Poŝtelspezoj, telefonado, k.t.p. (Estraro kaj komisiitoj) (1500) – 706.82
03. Membrokartoj, papero kaj kancelariaĵoj (1000) – 790
04. Bankaj kaj librotenistaj elspezoj (400) – 70
05. Kotizo al UEA (3800) – 1627
06. Investo en fondusojn (1000) – 2397.1
07. Investo en projektojn (tutrusiajn) (5000) – 1110
08. Subteno de kluba agado (3000) – 0
09. Subteno de regiona agado (3000) – 600
10. Nebuĝetitaj elspezoj – 627

Sume elspezoj: buĝeto – 23700; reale – 14127.92

ENSPEZOJ

01. Kotizoj individuaj (4800) – 5691.88
02. Kotizoj klubaj (5500) – 2600
03. Libroservo (5000) – 0
04. ĈALK (300) – 320
05. Profito de la aranĝoj (5000) – 5880
06. Rento de la fondaĵoj (1400) – 5960.92
07. Subvencioj, donacoj (1700) – 1210
08. Nebuĝetitaj enspezoj (4500) – 16032.68

Sume enspezoj: buĝeto – 23700; reale – 37695.48

SALDO

buĝeto – 0; reale – +23567.56

NUNA STATO DE LA KASO (02.02.2004)

rubloj: 26 296,06
eŭroj (en la konto ĉe UEA): 469,33
pruntedonitaj: 10 000,00 rub.
fondaĵo "La 2-a jarcento de Esperanto": 300 dolaroj
fondaĵo "Dumvivaj membroj": 370 eŭroj

Mikaelo Ĉertilov, la komisiito pri financoj

MEDITOJ KAJ KONSIDEROJ PRI LA MOVADO KAJ ASOCIO EN RUSIO

Karaktero de nia movado

Sociaj movadoj kaj unuiĝoj povas esti profesiaj (asocioj de artistoj, sindikatoj k.s.), duonprofesiaj (grandaj politikaj partioj, bonfaraj organizoj, sociaj organizoj por jura helpo al civitanoj ktp., ricevantaj financan subtenon de mecenatoj aŭ de la ŝtatoj), kaj amatoraj (granda plimulto de sociaj organizoj, etaj partioj ktp.). Nia movado estas esence amatora, ĉar esperoj ricevi ian subtenon de mecenatoj aŭ de la ŝtato estas efemeraj; se ni foje ricevas iom da mono, ĝi neniam sufiĉas por profesiigi nian agadon.

Do, malgraŭ ajnaj deziroj, ni povas ekzisti nur sur nia propra bazo, kaj la sola fonto por nia ekzisto estas propra entuziasmo de la movadanoj. En kutimaj por esperantistoj terminoj tio nomiĝas "desubismo", kontraste al "desuprismo" (profesieco). Kiom ajn la lasta estu alloga kaj avantaĝa, ĝi restas nur utopio. Tiel statas la aferoj ne nur en Rusio kun nia malforta movado, sed ĉie, ankaŭ en la landoj kun movado tre forta.

Karaktero de nia asocio

Sekve, la landa asocio povas esti nur organizo de homoj, kiuj unuiĝas por partopreni komunan agadon aŭ almenaŭ esti informita pri ĝi, ne pli, kaj kiuj dediĉas al tiu agado nur tiom da fortoj kaj tempo, kiom ili povas sur amatora, neprofesia bazo. Ĉiuj ŝtupoj al la funkciado de la asocio devas konsideri nian amatoran karakteron.

Samtempe, ni ne povas strebi al tio, ke ĉiuj esperantistoj de la lando apartenu al REU: por tre multaj homoj la movadaj aferoj, la komuna agado ktp. estas simple ne interesaj. Interalie, ekzisto de pluraj homoj, kiuj uzas Esperanton por nur propraj malvastaj celoj, estas unu el pruvoj de ĝia viveco.

De la alia flanko, la ĉefa funkcio de la asocio (por la membroj) estas informado: ni rememoru, ekzemple, la sperton de REA, kiu estis, fakte, aro da abonantoj de la gazeto "Ruslanda Esperantisto" – ne pli, sed ja ne malpli. Oni kiel ajn rilatu al tio, sed la asocio ekzistis! Principe, tio sufiĉis. Do, se ekzistas aliaj agaddirektoj, oni povas aprobi kaj subteni tion, sed ili estas nur akcesoraj kaj aldonaj sekvoj de la informado, ĉar tiuj agaddirektoj tutegale plenumiĝas ĉefe sur la loka nivelo kaj bezonas pli informan ol organizan subtenon.

Agado de diversaj generacioj

La E-agado en nia lando efektiviĝas per homoj de diversaj generacioj, kiuj iom malsamas laŭ sia konduto kaj funkcioj en la movado. Tiuj estas junularo (homoj ĝis, proksimume, 35-jaraĝaj), mezaĝuloj (inter 35 kaj 60) kaj veteranoj (pli-malpli super 60-jaraĝaj).

REU kaj plejparto de la lokaj organizoj (kluboj) konsistas ĉefe el kaj estas gvidataj ĉefe de mezaĝuloj. Ĉiuj atingoj en la movado apartenas al ili, sed ili estas ankaŭ ĉefa objekto de la kritiko far ĉiuj esperantistoj de la lando pro la malsukcesoj kaj malaktiveco. Tio estas justa, kaj la sola sinpravigo ilia estas, ke ili – asociaj kaj klubaj gvidantoj – estas tiuj, kiuj faras, kaj ilia agado, kun ĉiuj siaj avantaĝoj kaj mankoj, estas reflekto de la ĝenerala stato de la esperantista komunumo en la lando.

Ili povas fari nur tiom, kiom kapablas sur la supremenciita amatora bazo, kaj ilia laborkapablo en tiuj kondiĉoj estas limigita. Krome, plejparto el ili ja estas simplaj homoj, havas pigremon kaj sinĝenemon, ne estas tiaj freŝaj kaj sanaj kiel gejunuloj. Sur tiu ĝenerala fono aparte admirindas pro sia senlaca agemo du personoj – G.Kokolija kaj M.Bronŝtejn, kiuj faras tiom multe, kaj tiom altkvalite, ke vere faras la fundamenton por la tuta movado en ĉiuj kampoj! Sufiĉas diri, kvankam tio apartenas al iom alia tereno, ke Bronŝtejn produktas pli da literaturaĵoj, ol ĉiuj niaj ceteraj verkistoj, bardoj kaj tradukistoj kune! Multo dependas ankaŭ de sindediĉa laboro de I.Gonĉarova kaj M.Ĉertilov – ankaŭ sen ili nia movado estus multe pli malriĉa, eĉ se oni ne ĉiam tion rimarkas. Ĝuste tiuj, kiuj agas, ricevas plejmulte da batoj, kaj la fakto, ke Kokolija kaj Gonĉarova estas la plej kritikataj homoj, signifas ke ili faras tre multe. (La fakto, ke kritikantoj "ŝatas" ankaŭ min, estas escepto, kiu konfirmas la regulon: mi faras multe malpli ol ili.)

Veteranoj estas homoj kun granda movada sperto, ofte plu aktive agantaj, sed plejparte ne tiom kaj ne tiel kiel antaŭe. Plej gravas iliaj ideoj kaj kritiko, eĉ se mi kaj aliaj mezaĝaj "stirantoj" kun ili ne konsentas. Eĉ eraraj ideoj de tiuj homoj estas multe pli utilaj ol senideeco de plimulto, ĉar vekas la pensadon kaj helpas formuli la celojn kaj strategion. Plej interesaj ideoj venas de E.Perevertajlo kaj A.Gonĉarov.

Perevertajlo ĉiam insistas, ke estonto de Esperanto dependas de ĝia apliko en diversaj ekstermovadaj profesiaj medioj, ke la celo de la movado estas aplikigi nian lingvon inter sportistoj, sciencistoj, politikistoj ktp. Ĉar mi havas negativan sperton tiurilate (la aplikuntoj de Esperanto volonte akceptas peran helpon de esperantistoj kaj tuj rifuzas ĝin kiam vidas niajn limigitajn eblojn), sobre pritaksas magrajn rezultojn de sciencaj aplikoj de Esperanto en AIS k.s., mi venis al alia konkludo. Jes, Esperanto vivos nur en sia aplikado, sed la ĉefa aplikado estas simplaj kontaktoj de simplaj homoj – kaj tial plej grava aplikado estas organizado de renkontiĝoj, kongresoj; do ĝuste tio, pri kio ni ŝatas okupiĝi (kaj kio estas pleje kritikata).

Gonĉarov, venenita dum lastaj 15 jaroj de raŭmismo kaj poste – civitismo, insistas pri profesiigo de instruado kaj edukado. Mi ne konsentas kun li. Unue, nia movado nun estas esence amatora, kaj dum proksima tempo ni ne povos tion ŝanĝi. Due, E-kulturo (des pli "elĉerpa kurso" pri ĝi), kiel nepra kondiĉo de esperantigo de la homoj, estas nekorekta: ne ĉiuj potencialaj esperantistoj, ankaŭ estontaj aktivuloj, interesiĝas pri la kulturo (tiujn sciojn oni postulu nepre nur de la instruistoj), kaj la postulo povas eĉ forpuŝi certajn valorajn homojn. La principo "Ni devas kreski, jes, ne kvante, nur kvalite" estas erara almenaŭ pro tio, ke kvalita kresko povas okazi nur surbaze de la kvanta. Des pli en kondiĉoj de neevitebla amatoreco, batali kun kiu estas ne nur erare, sed eĉ malutile. Alia afero, ke kreskigo de la ĝenerala kultura nivelo devas esti grava direkto de la laboro de REU – kaj pri tio ni ja ĉiam pli aktive okupiĝu kaj en la kluboj, kaj dum la renkontiĝoj.

Junularo (eĉ relativa, ĉar mi konsideras ĉu tie "junuloj" ĉiujn homojn ĝis 35) estas la tria aĝa grupo, kiu influas ne nur la nunan staton de la movado, sed ankaŭ ĝian estonton. Mi ne analizos la staton de la junulara movado – tion prefere faru funkciuloj de REJM, sed mia ĉefa rimarko estas jena. Bedaŭrinde, la junan aktivularon karakterizas malstabileco. Jen aperas iu nova esperiga homo, kiu multon

faras, sed pasas kelka tempo – kaj li/ŝi senspure malaperas. Kaj mi kun anima tremo nun pensas, ĉu restos por longa tempo tiaj brilaj personoj, kiuj povus difini la estonton de la movado, kiel S.Ivanov kaj O.Izjumenko, aŭ ankaŭ ili iam-iensenspure… Mi esperas, ke ne.

La dua afero, pro kiu mi malĝojas, estas nestrebo de certaj plej kapablaj homoj el la junulara medio ekgvidi la movadon landskale. A.Blinov kreskigis jam kelkajn generaciojn de novaj aktivuloj – sed ili brile agas ĉefe en Ĉeboksari, kvankam kapablus ekgvidi la tutan movadon en Rusio! Kial? Mi ne komprenas. Se JEAĈR volus, ĝi povus rapide fariĝi kerno de REU, liverante al la landa asocio bone preparitajn aktivulojn kaj instruistojn, poiome elirantaj el la "juna" aĝo.

Ĉu perspektivoj?

La tuta movado en Rusio ne estas esperiga. Kaj, certe, ĝia organizita parto – REU ne povos en proksimaj jaroj akceli ĝian kreskon kaj stabilon. La stagna situacio en la makrosocio neeviteble reflektiĝas en nia mondeto. Do, eĉ la plej kapablaj gvidantoj apenaŭ ŝanĝos la situacion draste: la bona gvidado nun signifas iun (kun)ordigon de la plej necesaj aferoj. La prioritata afero estas instruado kaj progresigo de komencantoj; se tiu laboro progresos, la tuta movado progresos, sed ĝuste en tiu, plej grava, direkto mi ne vidas rezervojn por rapida evoluo. Ho, kiel mi volus erari!!!

Nikolao Gudskov (Moskvo)

REU ne nur ekzistas, sed, sendube, funkcias – jam tio estas bona. Eĉ pli: REU sukcese alfrontas novajn gravegajn direktojn de la agado. Temas, laŭ mi, unuavice pri ekstera agado, kiu ĉi-periode estas multflanka kaj fruktodona: de partopreno en la Tutrusia Konferenco de sociaj organizoj ĝis partopreno en neesperantistaj junularaj aranĝoj (ekzemple, Studenta Tendaro en Konakovo, kie aktivege agadis 6-opa esperantista grupo kun sinprezentoj, standoj, ardega multhora diskuntrondo pri signifo de Esperanto), de laboro kun amaskomunikiloj ĝis lanĉado de E-instruado en MGPU. Mi ŝatus, ke ni konsciiĝu pri tio kaj firmigu laboron en tiuj direktoj.

Dum 10 jaroj mi kunordigas laboron de EK MASI – la plej multnombra aliĝinta kolektivo de REU. Por MASI tiu ĉi agadperiodo estas ege multsignifa: inter gejunuloj aperis aktivuloj, kiuj prenas sur sin respondecon pri gravaj labordirektoj, kiel kunordigado de MAK (Moskva Antaŭkongreso), de MASI-programaro en IJK, de kluba kunordigado. Tio ĉi esperigas pri apero de gvidantoj-gejunuloj ankaŭ en Moskvo (pluse al Ĉeboksari kaj, eble, aliaj urboj, pri kiuj mi ne kompetentas).

Do, ĝuste tiujn du direktojn, kiuj reliefiĝis, eble, ekster speciala intenco, sed pro ia ŝanĝo en nia movado, en niaj homoj aŭ en la ekstera socio, necesas atenti kaj progresigi. Nome: labori kun la ekstera mondo kaj gvidantigi junularon (daŭre zorgante pri alveno de novaj gejunuloj en la movadon). Ĉe moskvaj gejunuloj mi rimarkas tendencon "De konsumado kaj sinesprimado al konscia poresperanta agado". En tio mi vidas unu el fruktodonaj vojoj por nia estonta evoluo.

Ĉar mi ne ĉeestos en REK, mi ŝatus diri ĉi tie, ke mi altege taksas kaj multe aprezas laboregon de la nuna kaj antaŭa REU-prezidantoj Nikolao Gudskov kaj

Garik Kokolija. Ĝenerale mi dankas la tutan Estraron pro konkorda, senturmenta kunlaboro, pro takto en interrilatoj ene de la Estraro kaj amika helpo kaj subteno. Tion mi ĉiam pretas reciproki.

Irina Gonĉarova (Odincovo)

Pri la stato de la movado

Multas:

– kritikistoj (nemalbona profesio, se ne pli ol duono de la aktivuloj);
– homoj, kiuj agas en sia tereno, sed faras tion nur laŭ sia intereso.

Mankas:

– gvidantoj, kiuj povas preni tiun anaron, teamigi kaj direkti;
– respondecaj homoj, kiuj povas bone plenumi komisiitan taskon.

Rezulte kion ni havas:

– ekzistas kelkaj projektoj, pri kiuj okupiĝas koncernaj unuopuloj. Poste intereso al la projekto falas, aperas novaj projektoj, sed la malnovaj ĉesas aŭ vegetas. Ne estas organizo, kiu povus rekomisii la projekton al alia homo. La projektoj estas tro personecaj;
– mankas strategio, ĉar se eĉ verki ĝin, kiu plenumos?

Tion ni vidas en multaj agaddirektoj. Ekzemple estas kelkaj retprojektoj, sed ĉiu havas siajn malavantaĝojn. Mankas sistemeco. Nu, eble en la reto tio ne estas tre bezonata, sed en la kluba kaj regiona agado tio estas nepra. Kelkaj kluboj bone baraktas, tenante sin en sufiĉa formo kaj okazigante iujn aranĝojn. Ilia sperto ne estas utiligata en aliaj kluboj. Same pri laboro kun amaskomunikiloj: fojaj sukcesaj kontaktoj en persona nivelo, fojaj laŭprotokolaj rebojoj al iliaj publikaĵoj, sed mankas sistema laboro. Ktp, ktp.

Laboro de la Estraro:

– sekvo de la supre dirita. Multaj estraranoj bone plugas sian sulkon, sed mankas ĝenerala kunordigo. Ekzistas nek fera mano de gvidanto, nek emo de estraranoj okupiĝi pri neinteresaj aferoj.

Kion ni faru:

– vivu plu. Ne eblas preni de homo pli ol tiu povas doni. Gvidantojn oni ne serĉas, ili aperas mem;

– ni ellaboru almenaŭ komprenon de la situacio (realan stat-konstaton).

Al la kandidatoj:

– ne proponu grandajn projektojn al la asocio. Kio malhelpis al vi efektivigi ilin antaŭe? La posteno donos al vi neniujn pliajn eblojn ordoni al la homoj (bedaŭrinde);

– se vi diras, ke necesas fari ion, tio signifas aŭ ke 1) vi intencas fari tion, aŭ ke 2) iu alia devas fari tion. Klare indiku tion en la proponoj.

Rimarko. Se vi volas respondi, pensu, en kiu kategorio (vd. komence) vi ŝatus esti listigita.

Jurij Karcev (Uljanovsk)

LASTAJ ALIĜOJ POR 2003

Jam post fino de redaktado de la antaŭa numero de REGo venis ankoraŭ REU-aliĝoj por 2003.

ALIĜINTA KOLEKTIVO

Samara E-klubo (+ 2 novaj aligitaj membroj): *Radajev Anatolij, Suslov Vjaĉeslav*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Junusov Abdurahman (Mahaĉkala), Lunde Jelena (Norvegio)

Rezulte en 2003 REU havis 273 membrojn, inter kiuj estas 180 individuaj membroj (inkluzive 45 dumvivajn kaj 5 familiajn) kaj 93 aligitaj membroj (apartenantaj al 8 aliĝintaj kolektivoj).

NOVAJ REU-ALIĜOJ POR 2004

ALIĜINTAJ KOLEKTIVOJ

Moskva E-klubo "MASI-FaRo" (24 aligitaj membroj): *Baŝlikova Anastasija, Boljŝakov Roman, Budinovskaja Jelena, Burgar Ksenija, Ĉajkova Anna, Ĉerniŝova Oljga, Fazilova Marianna, Gonĉarova Svetlana, Izjumenko Oleg, Kastra Alina, Kokorev Dmitrij, Kudrjaŝova Alla, Ljubuŝina Jekaterina, Morozova Jelena, Morozova Viktorija, Ovĉinnikov Mihail, Pantelejev Aleksandr, Popkova Oljga, Sergejev Vladimir, Sidorova Valentina, Vinokurov Aleksej, Zatulov Sergej, Zatulova Marija, Zubcova Marija*

Ivanova Medicinista Esperanta Asocio (IMEA) (6 aligitaj membroj): *Ĉerjomin Roman, Ĉerjomina Ljubovj, Davidko Tatjana, Popcova Angelina, Proŝina Jelena, Volkov Pavel*

Vladivostoka E-klubo "Pacifiko" (15 aligitaj membroj): *Abisova Ljudmila, Arĥipova Ljudmila, Bratĉikova Rada, Ĉernozub Ljudmila, Karpeta Ljubovj, Koneva Galina, Makŝanov Viktor, Neunilova Nadeĵda, Pilneva Dina, Semjonova Valentina, Ŝlepĉenko Gennadij, Tiŝĉenko Margarita, Titajev Aleksandr, Udovickaja Nadeĵda, Zaloznaja Ljubovj*

INDIVIDUAJ MEMBROJ

Basov Gennadij (Moskvo), Blinov Aleksandr (Ĉeboksari), Burgar Lilija (Rostova reg.), Ĉerepanov Valerij (Moskvo), Demjaŝev Oleg (Naberejnije Ĉelni), Griŝin Maksim (Moskvo), Jaroŝenko Jelena (Rostova reg.), Kabanceva Alevtina (Moskvo), Koklenkov Anatolij (Moskvo), Kolosov Eduard (Volgograd), Kondratjev Boris (Sankt-Peterburg), Konjaŝova Svetlana (Ĥabarovska reg.), Kroter Stanislav (Tomsk), Kuljkov Jevgenij (Vladimir), Liskov Andrej (Moskvo), Loŝmanov Anton (Komsomoljsk-na-Amure), Lukjanov Vladimir (Kurska reg.), Lunde Jelena (Norvegio), Makarenko Valerij (Tverj), Masjukas Aleksandras (Murmansk), Minin Vladimir (Usono), Nikiforova Jekaterina (Kazanj), Opletajev Vladimir (Surgut), Prilepskaja Ksenija (Moskvo), Samodaj Vladimir (Moskvo), Simonov Igorj (Niĵnij

Novgorod), Strelec Sergej (Ĉeljabinsk), Sudakov Vladimir (Primorskij reg.), Ŝevĉenko Anastasija (Irkutska reg.), Tarĥan Ermita (Moskvo), Vajnapelj Jurij (Irkutsk)

REU-KOTIZOJ POR LA JARO 2004

50 rubloj (por eksterrusianoj – 5 eŭroj) – ***individua kotizo*** (la membrokarto, Jarlibro de REU, REU-bulteno kaj aliaj informoj de REU, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

1250 rub. (por eksterrusianoj – 125 eŭroj) – ***dumviva kotizo*** (ĉio la sama dum la tuta vivo);

25 rub. – ***familia kotizo*** (la membrokarto, voĉdonrajto en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj);

100 rub. + 25 rub. por ĉiu aligita membro (ne malpli ol 5; krom individuaj membroj de REU) – ***kolektiva kotizo*** (po 1 ekzemplero de REGo kaj Jarlibro de REU por ĉiu komenciĝinta deko de la aligitaj membroj, aliaj informoj de REU por la kolektivo; la membrokartoj, voĉdonrajtoj en REU-Konferenco, rabatoj ĉe uzo de REU-servoj kaj en E-aranĝoj por la aligitaj membroj).

La rabatita abono de REGo por ajna individua membro de REU (inkluzive la dumvivajn kaj familiajn, sed ne por la aligitaj) en 2004 kostos 100 rublojn (por la eksterrusianoj – 12 eŭrojn). La dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon post la apero de REGo (kaj tial ilia kotizo enhavis la koston de REGo) plu ricevados REGon sen aldona pago. Aliaj dumvivaj membroj (kies kotizo ne inkludis la koston de REGo) por ricevi la gazeton devos pagi ĉiujare la rabatitan abonkoston.

La rublaj kotizoj sendendas al G.Kokolija (la adreso estas en la lasta kovrilpaĝo), la eŭraj kotizoj pagendas al la konto reua-p ĉe UEA.

ATENTIGO

Ĉar jam venis kelkaj eraraj monsumoj por la kotizoj en 2004, mi ŝatus doni kelkajn klarigojn pri la nova sistemo de REU-kotizoj. Sube vi trovos, kiom da rubloj devos pagi rusiano por esti REU-ano en tiu aŭ alia kategorio. Enkrampe estos indikita la koncerna kotizo en eŭroj por la loĝantoj de aliaj landoj.

Se vi volas en 2004 esti individua membro de REU kaj ricevadi REGon, vi devas sendi 150 rublojn (17 eŭrojn). Se vi volas en 2004 esti individua membro de REU, sed ne volas ricevadi REGon, vi devas sendi 50 rublojn (5 eŭrojn). Se vi ne volas en 2004 esti individua membro de REU, sed volas ricevadi REGon, vi devas sendi 140 rublojn (15 eŭrojn). Se vi estas dumviva aŭ familia membro de REU kaj volas ricevadi REGon en 2004, vi devas sendi 100 rublojn (12 eŭrojn). Nur la dumvivaj membroj, kiuj pagis sian kotizon dum lastaj 3 jaroj (kiam la kotizo jam inkludis REGon), ricevados REGon sen aldona pago.

Garik Kokolija (Moskvo)

REJM-info

JAM 122 IJK-ANOJ! KIO PRI VI?

Rusiaj esperantistoj ricevas unikan ŝancon. Por renkonti aron da gesamideanoj el multaj landoj ni bezonos nur… veni al Kovrov (Vladimira regiono) la 10-17-an de julio! Tie okazos ĉi-jare grandega aranĝo – Internacia Junulara Kongreso (IJK) kun la temo "Internacie, june kaj kune". Pli detale pri IJK al ni rakontas du membroj de la organiza teamo – Vitalik Malenko kaj Maŝa Terjoĥina.

– Kiom da homoj jam aliĝis al IJK? El kiuj landoj?

Vitalik: Por la fino de januaro entute aliĝis 122 homoj: Rusio – 76, Germanio – 10, Francio – 9, Nederlando – 4, Danio – 3, Kroatio – 3, Norvegio – 2, Niĝerio – 2, Jugoslavio – 2, kaj po 1 de Pakistano, Rumanio, Belorusio, Usono, Britio, Hispanio, Irano, Hungario, Kanado, DR Kongo, Svedio; inoj/viroj – 67/55.

– Kio estos en programo de Internacia Junulara Kongreso?

Maŝa: La programo havas tri ĝeneralajn direktojn: tema programo (Esperanto kaj Esperanto-kulturo, interna kaj por-socia movado, metodoj de instruado, TEJO: sistemo de la organizo, seminarioj ktp.), kultura programo (kulturo de Rusio kiel lando de IJK, kulturoj de aliaj landoj-partoprenantoj) kaj distra programo (noktaj kaj vesperaj programeroj, komunaj aranĝoj, koncertoj ktp). Certe ne eblas tute ĝuste dividi ĉiujn direktojn. Homoj kun tute diversaj gustoj, atendoj kaj hobioj trovos por si – tiel kredas ni, organizantoj – interesajn, utilajn, ŝatatajn kaj neŝablonajn okupojn! El la plej interesaj programeroj mi povus nomi tiom diversajn aferojn kiel festivalo de kulturoj, kinoprogramo (kiu enhavos rusiajn filmojn, parte kun subtitoloj, parte tradukitajn, de diversaj jaroj kaj ĝenroj), Olimpikon kun elementoj de diversaj kulturoj, kaj certe karnavalon dum la lasta vespero! Krome, ni ne forgesu pri studioj kaj kursoj, kaj pri surprizoj, kiuj estas nepra parto de ĉiu Internacia Kongreso! Planata estas prezentado de eksterlandaj kaj rusiaj aranĝoj, dum kiu oni povos ne nur ekscii pri diversaj ebloj renkontiĝi kaj komunumi en Esperanta mondo, sed ankaŭ travivi mem tipajn programerojn de la aranĝoj, kio certe helpos fari ĝustan elekton en estonto.

– Kia devas esti nivelo de lingvoposedo por partopreni IJK-on?

Vitalik: Certe la kongreso estas aranĝo por Esperanto-parolantoj. Kaj granda kvanto de eksterlandanoj helpos al nekrokodilado. Ni eĉ provos loĝigi homojn tiel, ke en sama ĉambro troviĝu ne nur rusianoj aŭ eksterlandanoj, sed miksita publiko.

– Ĉu novuloj tamen povos partopreni?

Vitalik: Novuloj estas bonvenaj. Sed unue ili venu al OkSEJT, kiu okazos an-

taŭ la Kongreso en la sama loko la 05-10-an de julio. Jam trian fojon OkSEJT estos instrua: speciale organizita aranĝo por komencantoj. Ĉi-jare OkSEJT estos por ni grava helpo, ĉar ĝuste ĝi permesas reklami IJK-on en neesperantistaj junularaj organizoj: unue venu al OkSEJT kaj lernu la lingvon, kaj poste partoprenu Internacian Kongreson! Ĝuste tiel ni reklamas nun niajn aranĝojn pere de Ŝtata Komitato pri Junularaj aferoj. Ni respondos ajnajn demandojn pri OkSEJT, kiujn vi sendos al la adreso <oksejt@inbox.ru>.

– Kaj ĉu por jamaj esperantistoj okazos io antaŭ aŭ post IJK?

Vitalik: Certe! Planatas tiel nomataj Antaŭ- kaj Postkongresoj. La Antaŭkongresoj (AK) okazos samtempe en Moskvo kaj en Peterburg. Estos ĉefe turisma programo celanta eksterlandanojn. Sed ankaŭ aliaj esperantistoj estos bonvenaj. Legu pli pri tio en la artikoloj de organizantoj de Antaŭkongresoj. La Postkongresoj (PK) okazos en Ĉeboksari (la 18-20-an de julio – ekskursa parto, la 21-22-an de julio – aktivada parto) kaj Novosibirsk. Fakte tio estos jam tradicia aranĝo de Novosibirska klubo RA (Renkontiĝo de Amikoj). Ĝi daŭros ekde la 20-a ĝis la 27-a de julio kaj estos celanta kaj eksterlandanojn, kaj rusianojn.

– Ĉu estas jam trovita bazejo por IJK?

Vitalik: Al multaj rusiaj legantoj de REGo la bazejo de IJK estas bone konata. Ĝi estas la eks-pionirtendaro en Kovrova regiono, kie jam okazis kaj OkSEJT, kaj RET. La bazejo tiom plaĉis al Nataŝa kaj Andrej Grigorjevskij, ke kiam ili la unuan fojon ekvidis ĝin, ili eĉ tiam komencis pensi pri okazigo de IJK surbaze de ĝi. Ĉu pli detale? Estas elekto de loĝofertoj (vidu sube). En la bazejo estas baseno, sportplacetoj, apudas rivero Kljazjma, multas belaj arbaroj. Kaj certe estas multe da ejoj por la programo: diskejo, trinkejo, gufujo, videosalono, ludejo. Venu kaj vidu ĉion per propraj okuloj!

– Kiu preparas Rusian IJK-on?

Vitalik: La organiza teamo konsistas el pli ol 10 aktivuloj, preskaŭ ĉiuj ili estas bone konataj por vi personoj: Vitalik Malenko (kunordigo, financoj, administrado), Natalja Grigorjevskaja (kunordigo, financoj, administrado), Aleksandra Fedotova (eksteraj rilatoj, tema programo, administrado, vizoj, PK en Ĉeboksari), Marija Terjoĥina (programa kunordigo), Slava Ivanov (varbado kaj informado, AK en Peterburg), Dmitrij Oŝĉepkov (distra programo, grupa laboro), Jekaterina Burmisova (interkultura programo), Jekaterina Ignatjeva (kontaktoj kun TEJO, financoj), Irina Gonĉarova (grupa laboro), Valentina Sidorova (AK en Moskvo), Nadeĵda Ĥaritonova (OkSEJT), Alla Kudrjaŝova (nokta programo).

Maŝa: En preparado de IJK aktive partoprenas lokaj kluboj. Ĉeboksara Esperanto-Asocio preparas ĉefe temajn kaj interkulturajn programerojn. MASI-anoj (pli bone diri MASI-aninoj, ĉar dume junulinoj pli multas en la iniciata grupo) prenis

respondecon pri la nokta programo (diskejo, trinkejo, ludejo, lignofajro).

– *Ĉu ankoraŭ eblas ekpartopreni en organizado?*

Vitalik: Jes, certe! Ni bezonas multe da helpantoj por IJK. Estas bonvenaj viaj proponoj pri la programo (sendu ilin al Maŝa Terjoĥina <maria.terekhina@mail.ru>). Krome, dum IJK estos multe da diversaj mastrumaj kaj organizaj taskoj – certe ni varbos volontulojn kaj vi jam nun povas enlistiĝi.

– *Kiel eblas aliĝi al IJK?*

Vitalik: La plej facila vojo estas sendi monon (per rubloj, laŭ la kurzo de Centrobanko + 1%) al *428024, Чебоксары-24, а/я 35, Тумашкову Андрею Николаевичу;* kaj poste plenumi aliĝilon ĉe <www.tejo.org/ijk>. Alia eblo estas transdoni monon kontante al Slava Ivanov aŭ al mi. Nuna aliĝkotizo por rusianoj estas 5 eŭroj (ĝis 20 jaroj), 7 eŭroj (ĝis 27 jaroj), 10 eŭroj (pli ol 27 jaroj). Se vi ne havas ret-aliron, vi povas sendi al ni plej bezonatan aliĝinformon: nomo, plena adreso, naskiĝdato, loĝmaniero, manĝmaniero, proponoj. Estas sekvaj loĝvariantoj: 3-lita ĉambro (40 eŭroj kontraŭ 1 lito por la tuta periodo), 6-lita ĉambro (30 eŭroj), 12-lita ĉambro (20 eŭroj). Kaj estas sekvaj manĝvariantoj: plena 3-foja manĝado por la tuta periodo – 35 eŭroj, nur tagmanĝoj – 14 eŭroj, nur vespermanĝoj – 21 eŭroj.

intervjuis Sonjo Ŝejnina

MASI SEMIS MAKON

MAK. Kia bildo aperas antaŭ viaj okuloj? Eble, petaltremanta ruĝa floro papavo? Forgesu. Devas aperi gaja Petruĉjo, elŝovinta langeton, kun kloŝĉapo aludanta pri Kremlo. Nun vi vidas la emblemon de la Moskva AntaŭKongreso (MAK). Konsentu – ĉarma!

MAK estas orientita unuavice al la eksterlandanoj, kiuj intencas partopreni IJK-on en Kovrov, do la datoj estas senpere antaŭaj: la 06-10-a de julio, inkluzive la tagojn de alveno kaj forveturo. La gastoj loĝos en nemultekosta hotelo kaj ĝuos varian programon por ajnaj gustoj – de la plej tradicia vizito al la Ruĝa Placo ĝis diboĉado en la plej modaj noktaj kluboj. Laŭ la elekto de la programeroj formiĝos grupoj, vivantaj laŭ sia plano. Ni pripensas ankaŭ sociajn kaj promociajn akciojn por Esperanto, renkontiĝojn kun amaskomunikiloj, lokaj esperantistoj k.s.

MAK estas iniciatita kaj organizata de MASI (Moskva Amikaro de Studantoj kaj Instruantoj). La ideo pri MAK apartenas al Grimpi (Valentina Sidorova) kaj Benita (Alla Kudrjaŝova). Do, ili estas la ĉefaj organizantinoj de la tuto: Grimpi kunordigas la laboron de nia OK kaj zorgas pri loĝigo kaj manĝigo de niaj gastoj, Benita okupiĝas pri la programo. Aktive engaĝiĝis Denaska (Svetlana Gonĉarova), kies tereno estas "Kontaktoj kun partoprenontoj". Poiomete aliĝas al la organizado ankaŭ aliaj MASI-anoj. Grandan moralan kaj konsilan subtenon ni ricevas de IJK-kunordiganto Vitalik Malenko (MAK estas oficiale agnoskita de TEJO kiel Antaŭkongreso de IJK, samkiel la Antaŭkongreso en Sankt-Peterburgo).

La emblemon faris nia dezajnisto Onjo (Olga Ĉerniŝova), kiu kreis ankaŭ la belegan reklamfolion pri MAK, disdonitan al eksterlandanoj dum novjaraj internaciaj renkontiĝoj IS kaj IF en Germanio, AS en Pollando. Nun Onjo zorgas pri MAK-paĝaro en Interreto <http://moskvo.ru>.

Valentina Sidorova, Alla Kudrjaŝova, Svetlana Gonĉarova

Nun – informo speciale por la ĉefa legantaro de REGo. Ni ne ŝatas diskriminacion. Ni deziras ebligi ankaŭ al vi, rusianoj kaj civitanoj de eksa Sovetio, kunpartoprenon en la belaj gajaj internaciaj turistaj tagoj en Moskvo. Por vi la aliĝkotizo estas nur 10 eŭroj. Se vi havas problemojn pri loĝado aŭ aliajn, se vi volas-povas helpi al ni prizorgi la eksterlandanojn – turnu vin al la OK <mirina@online.ru>.

Kion oni semas, tion oni rikoltas. Ni semis MAK-on. Ni kredas rikolti sur Moskva grundo belajn ardajn florojn de internacia amikeco. Bonvenon!

Irina Gonĉarova, kunordiganto de MASI

VIDPUNKTO PRI IJK

de TEJO-reprezentanto en LKK Katja Ignatjeva

Imagu: kunvenigi kelkcenton da gejunuloj el kelkdek landoj, parolantaj diversajn lingvojn kaj havantaj malsamajn interesojn, al unu sama aranĝo – kio okazos? La respondo estas – IJK, Internacia Junulara Kongreso. La plej speciala parto de IJK estas ĝia etoso: dum IJK neniu povas resti sola. Eĉ se vi estas tre specifa homo kun ege specifa hobio aŭ tre nekutima vivstilo, vi havas ĉiujn ŝancojn trovi tie vian samideanon. IJK donas lokon al ĉiuspecaj homoj: trankvilemaj personoj povas ĝui komunikadon en gufujo (nokta kafejo kun amika etoso, kie eblas trankvile komunikiĝi kaj ĝui bonan muzikon), bruemuloj povas ĝui la tutnoktan diskejon; fervoraj esperantistoj, kiuj emas movadumi, povas partopreni diskutrondojn kaj komitatkunsidojn de TEJO, dezirantoj amuziĝi – la distran programon... Alivorte: ĉiu homo povas trovi lokon por si en tiu bunta, gaja kaj internaciega aranĝo. Ĝuste tio estas la ĉefideo de IJK – kunigi diversajn homojn kaj montri, ke plej diversaj homoj de plej diversaj landoj tamen tre similas unu la alian kaj povas iĝi bonaj amikoj!

ANTAŬKONGRESO EN PETERBURGO

La Peterburga Antaŭkongreso (AK) okazos 06-09-an de julio 2004, eblos veni en ajna el la tri tagoj. Fine de la aranĝo ĉiuj kunvenintoj kune vojaĝos al IJK per rekta ununokta trajno ĝis Kovrov. La Antaŭkongreso en "Norda Venecio" pasos en la pinto de turisma sezono, dum la plej longaj blankaj noktoj kaj plej komforta vetero. Tio influos la programon, kiu konsistos el plej diversaj ekskursoj, promenoj, komunaj ludoj kaj noktaj koncertoj. Ĝenerale ni planas loĝigi partoprenantojn en hoteloj, sed eblas malpli koste loĝi "surplanke" – ni luas por ĉiuj tri tagoj kelkajn ĉambrojn en la ejo ĉe kruciĝo de Fontanka kaj Nevskij prospekt. Pli oportuna loko estus nur eble en la Rusa Muzeo! Ĉiuj ĉefaj vidindaĵoj (ankaŭ la disigataj pontoj) estas atingeblaj piede, en la ejo mem estas necesejo, fridujo, aparta ĉambreto por manĝi. Unu tranokto en la amasejo kun matenmanĝo kostos 15 eŭrojn. Kvanto de lokoj estas limigita. Se vi decidos partopreni, nepre anoncu vin al la organizantoj anticipe. Informoj kaj aliĝilo troveblas en la IJK-paĝaro <www.tejo.org/ijk/>.

S.Andrejsons, S.Ivanov, L.Malunova (Sankt-Peterburgo)

INTERNACIE, JUNE KAJ KUNE...

Jam la 60-a kongreso malfermos pordojn al junularo (kaj ne nur) el ĉiuj partoj de la mondo. IJK-60, kiel vi jam scias, okazos la 10-17-an de julio en Kovrov, Vladimira regiono. Kovrov kiel nova "Mekko" de Rusia Esperantujo, denove kunigos homojn, sed la specifaĵo de nova renkontiĝo estos ĝia internacieco.

Kio estas IJK? Kio estas TEJO? Pluraj junaj esperantistoj scias tion nur onidire. Sed mi esperas, ke ĉiuj povas imagi, kia povas esti internacia junulara kongreso, kie ĉiuj uzas unu komunan lingvon. Kiam oni havas sian propran imagon, tiam ne gravas la imago de aliaj IJK-partoprenintoj, kiuj kun aspekto de spertulo povas diri: "Nu, tio ne estas kutima en IJK. Dum IJK ni kutime...". Mi ne volas kritiki IJK-on, en kiu mi mem neniam estis. Ne... Simple sen iu formita kompreno ni povas realigi nian propran fantazion, pripensi idealan internacian junularan aranĝon.

Kiel veraj rusianoj, ni prezentos nian vivmanieron. Dum rusaj E-aranĝoj ni ofte uzas metodon de grupa laboro, kiam ĉiuj estas invitataj al kunorganizado de la aranĝo. En la 60-a IJK tio estos unu el ĉefaj linioj de la program-realigo. Vi povas diri "nu, tio estos enua", aŭ "mi ne volas ĉiam esti kun iu, mi estas individuo kaj mi devas havi liberon de elekto", aŭ simple ne kompreni la ideon. Se al vi estos interese ekscii pli, demandu Maŝa Terjoĥina <maria.terekhina@mail.ru> (kunordiganto de la IJK-programo), aŭ Irina Gonĉarova <mirina@online.ru>, kiuj jam komencis pripensi majan seminarion pri grupa laboro por estontaj grupgvidantoj.

Du ĉefaj linioj de la programo estos "interkulturo" kaj "Esperanto-junulara movado" (kurte ni ĝin nomas "tema programo"). Kio estas interkulturo? Ni tiel nomas la situacion de libera kunvivado de diversaj kulturoj, kiam kulturoj ne englutas unu la alian, ne malaperas, sed vivas konservante sian specifaĵojn (lingvo, tradicioj, arto). Ĉu vi ne trovis en la priskribo de la termino "interkulturo" ian Esperantan koloron? E-mondo prezentas al ni unu el flankoj de tiu ideala mondo, en kiu sen forgeso de propra patrolando ni per universala lingvo prezentas interesajn flankojn de naciaj kulturoj kaj estas toleremaj al nekomprenaĵoj de nekonata kulturo.

Dum IJK ni volas organizi rusan foiron kun rondodancoj kaj kantoj, vi povos vesti vin per rusaj sarafanoj kaj bastoŝuoj. Vi nepre vidos perlojn de "Ora ringo": Vladimir, Suzdalj kaj Mstjora. Rusianoj! Ĉu vi mem scias ĉion pri via kulturo? Ni invitas vin al kolektiva kreado: prezentu viajn lokajn kulturojn – kredu ke la rusa kulturo havas diferencojn en diversaj regionoj kaj en Rusio loĝas multaj popoloj, pri kiuj ne ĉiuj havas ĝustan (ian ajn?) imagon. La temon de prezento de niaj landoj, popoloj ni daŭrigos dum Festivalo de kulturoj: tie ni preparos informajn standojn, montros naciajn kostumojn, faros artajn prezentojn (kantos, dancos...). Ĉu vi scias, ke la festo de Ivan Kupala ekzistas en diversaj landoj? Dum IJK vi ekscios veran historion de tiu festo.

Restas ankoraŭ interesaĵoj, pri kiuj mi nun ne rakontu: Orienta korto kaj rusa klubo (kun senfina teumado kun specifaj rusaj ringformaj panetoj "bubliki") kaj... nu, kial mi devas malfermi ĉiujn sekretojn? Devas resti iu enigmo.

Kaj nun estas tempo por paroli pri seriozaj aferoj. Ne suspiru. Ankaŭ seriozaj aferoj povas esti interesaj kaj prononcataj ne per voĉo de severa instruisto, sed per amika voĉo, kiu bruligos rigardojn de homoj kaj tuŝas korojn. Mi volas paroli kun vi pri Esperanto kaj pri tio, kiel apliki vian esperantistecon ekzemple tie, kie vi loĝas. Kiel gejunuloj el diversaj landoj organizas la esperantistan vivon kaj kiun impreson ĉe la homoj, kiuj loĝas apud vi, lasas pri si Esperanto? Ĉu estas iuj universalaj ekzemploj por ĉiuj?

Dum IJK ni volas fari interkonan konferencon de junularaj Esperanto-organizoj. Estas ege interese ekscii pri via vivo surloka, kiel vi prezentas Esperanton al la ekstera publiko. Ni provos konatiĝi kun la mondo de Esperanto-medioj. Ni invitas vin fantazii kune: kia por vi povas esti ideala TEJO en estonto kaj kion vi mem povas fari por tio?

Por krei interesan teman programon, kiu tamen restos en via cerbo, ni bezonas vian helpon. Ni proponas al vi respondi sekvajn demandojn:

Kiun lokon havas Esperanto en via vivo?

Donu kvin karakterizojn de TEJO.

Kion vi atendas de IJK?

Krome ni proponas al vi verki eseon pri la temo de ĉi-jara kongreso "Internacie, june kaj kune". Viajn ideojn, respondojn al la proponitaj demandoj kaj eseojn vi povas sendi al la adreso <e-centro@yandex.ru> aŭ poŝte: Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko, p/k 189, 428000 Ĉeboksari, Rusio.

Aleksandra Fedotova, IJK-respondeculo pri vizoj kaj tema programo

POSTKONGRESO EN ĈEBOKSARI

la 18-22-a de julio 2004

Organiza komitato: Junulara Esperanto-Asocio de Ĉuvaŝa Respubliko, Urba Ĉeboksara Esperanto-klubo "Ĉielarko"; kun la subteno de la Ŝtata respublika komitato pri junularaj aferoj.

La programo komenciĝos jam en la buso, ironta al Ĉeboksari. Estas planita ekskurso tra Kremlo en Niĵnij Novgorod kun manĝpaŭzo. Vespere – enloĝiĝo en Ĉeboksari: ni proponos du variantojn – malmultekosta amasloĝejo kaj

diverskomforta loĝado en proksima hotelo. Nia aranĝo daŭros 5 tagojn, kiuj siavice dividiĝas je 2 partoj: la ekskursa kaj la aktivada.

Dum la unuaj tri tagoj ni prezentos al vi interesajn flankojn de nia kulturo. Vin atendos ŝipekskursoj tra Volgo, piedaj promenadoj tra la urbocentro de la somera Ĉeboksari. Vespere ni prezentos al vi profesiajn koncertojn de folkloraj grupoj, metiejoj de popolaj manfaraĵoj, teatraĵetoj.

Por la sekvaj du tagoj ni invitos vin esti engaĝita al la loka esperantista aktivado. Per via helpo ni volas prezenti internaciecon de Esperanto al infanoj kaj gejunuloj de nia urbo. Ni organizos prezentojn de Esperanto, diversaj kulturoj kaj lingvoj en someraj tendaroj, intervjuojn ĉe amaskomikiloj. Ni faros diskutrondojn pri Esperanto-movado kaj rakontos pri la sperto de nia Junulara Esperanto-Asocio. Ni proponos al vi ankaŭ aliajn aktivaĵojn, kiuj estos interesaj por lokanoj kaj kontribuos al la favora bildo pri Esperanto-movado.

Prezoj: buso al Ĉeboksari – ĉirkaŭ 9 eŭroj; loĝado – ĉirkaŭ 10 eŭroj por 3 tagoj aŭ 15 eŭroj por 5 tagoj (temas pri neluksa studenta loĝejo, sed dezirantoj povas elekti hotelon kontraŭ proksimume 10 eŭroj por unu tagnokto). Oni manĝos laŭ sia bontrovo kontraŭ propra mono. La organizantoj konsilos pri oportunaj manĝejoj kaj pri gustumindaj pladoj; averaĝa kosto estas 2-5 eŭroj por unu manĝo. La programkotizo, pagenda surloke, estas 15 eŭroj por A-landanoj, 12 eŭroj por B-landanoj kaj 7 eŭroj por C-landanoj. Ĝi inkluzivas postkongresan gvidlibreton, piedan kaj busan ekskursojn, nacian koncerton k.s.

bela verda urbo Ĉeboksari

Por pliaj detaloj kontaktu Ĉeboksaran E-centron (Aleksandra Fedotova): tel. +7-8352-211180, fakso +7-8352-621064, retpoŝto <e-centro@yandex.ru>; Jekaterina Burmisova: tel. +7-8352-213126 (h), retpoŝto <molod6@cap.ru>; Aleksandr Blinov: tel. +7-8352-665908 (h), retpoŝto <delfeno@chtts.ru>.

STUDENTA TENDARO EN KONAKOVO

La 30.01-02.02.2004 kvin MASI-anoj (Mirina, Oleg, Indiano, Ero, Benita) kaj unu niĵnij-novgorodanino (Diana) partoprenis tiel nomatan Studentan Tendaron (en la urbo Konakovo de Tvera provinco), organizitan de junaj pedagogoj el la privata eksperimenta mezlernejo “Perspektiva”. La aranĝon partoprenis ĉ. 50 gejunuloj, ĉefe el Moskvo kaj Apudmoskvo, reprezentantoj de deko da junularaj organizoj – de pure politikaj (la socialista maldekstra partio ATTAK) ĝis bonfaraj (klubo por

infanoj-handikapuloj). Estis forta grupo el Sergijev Posad, nomanta sin Studenta Taĉmento "Gvidulo", kun multaj diversdirektaj substrukturoj.

La temoj, anticipe elektitaj por la traktado per interreta voĉdonado (ni elektadis inter, ŝajne, 20), estis la jenaj (ruse + traduko):

1. *Окончим институт. Что дальше? Ni finos la instituton. Kio plu?*
2. *Что есть достойная цель в жизни? Kio estas inda celo por la vivo?*
3. *Корни одиночества в современном мире. Radikoj de soleco en la nuntempa mondo.*
4. *Атомарность в образовании или студенческая самоорганизация. Atomeco en la klerigado aŭ studenta memorganiziĝo. (La temo ne estis traktita.)*
5. *Компьютеризация в образовании. Куда это ведёт? Komputiligo en la klerigado – kien ĝi kondukas?*
6. *Диффузия языков и культур. Опасно ли это? Difuzo de lingvoj kaj kulturoj – ĉu danĝere?*
7. *Аполитичность студентов у нас и политическая активность студентов на Западе. Почему так? Malpolitikemo de la studentoj ĉe ni kaj politika aktiveco de la studentoj en Okcidento. Kial tiel?*

La formoj de la traktado estis politikbatalo, karuselo, diskutrondoj, sinprezento de la organizaĵoj kaj projektado de kunlaboro.

> ⊂ Mi vidis la unuan akton de la dramo,
> ⊂ rakontas Kruko, ⊂ sed ne la duan.
> ⊂ Kial ne? ⊂ demandas Baniko.
> ⊂ Mi ne povis atendi tiom longe. En la programo estis presita "Dua akto ⊂ du jarojn poste". ***(esperanto-anekdotoj)***

La grupo de esperantistoj tre aktive kaj konstruive prezentis sin. Ni proponis fari standojn pri la organizaĵoj – ĉar ni havis, kion ekspozicii kaj kion disdoni (reklamaĵojn pri TEJO kaj "Lernu", ekzemple). Ni multe kontribuis al ĉiuj aranĝoj per niaj aktivaj elpaŝoj, ni konstante rakontis pri Esperanto kuluare al multaj interesitoj kaj, fine, ni eltenis la preskaŭ 3-horan debat-rondon pri Esperanto, komencinte – laŭ la propono de la organizantoj – la diskutrondon "Difuzo de lingvoj – ĉu danĝere?", kiu pasis paralele kun "Komputiligo en la klerigado..." kaj kolektis preskaŭ duoble pli da interesiĝantoj. La batalo estis tre serioza, la publiko estis saĝa, vastpensanta, klera; multaj kontraŭargumentoj estis freŝaj kaj saĝaj. Sed dank' al klera, science argumentita kaj senhezita gvidado de Oleg Izjumenko nia pozicio aspektis firme kaj konvinke. Rezulte, malgraŭ akraj situacioj, kiam eĉ ŝajnis, ke ni kun niaj oponintoj disiĝos malamike kaj por ĉiam, la gvidantoj de "Perspektiva" proponis al ni ejon en sia baza lernejo ĉe la metrostacio "Ŝabolovskaja" por E-kurso, ĉar kelkaj gviduloj sendube ekdeziris lerni la lingvon. Certe, pri la kurso ekinteresiĝis ankaŭ multaj aliaj ĉeestintoj.

Laŭ mi, estis nia fortaĵo, ke ni prezentis nin diversflanke, sed ne kiel adeptoj de la unusola ideo; Indiano (Dima Kokorev) rakontis pri "Greenpeace" kaj ekogrupoj, Oleg invitis partopreni la traduk-projekton por Vikio.

Do... Diri, ke ni lasis BONAN impreson, ne sufiĉas. Ni montris nin kiel kleraj homoj, interesitaj pri prospero de la homaro. Rimarkindas, ke fine de nia debatrondo unu el la organizantinoj diris: "Vi devus pli multe akcenti la noblan

IDEOLOGION de via movado, sed ne simplecon de la lingvo kaj avantaĝojn, kiujn vi dank' al ĝi ricevas". Jen la leciono: senti la publikon (kiun ni tradicie traktas kiel socie indiferentan kaj tial kutime hezitas paroli pri ideologio).

Konkludo: ni trovis novan interesan junularan medion, kiu arde emas kunlabori kun ni diversforme. Ni ricevis novan perspektivan terenon por reklami Esperanton kaj niajn aranĝojn, fari komunajn projektojn ks. Ni DEVAS ne pretergapi tiujn novajn eblojn!

Irina Gonĉarova (Odincovo)

Kaj jen estas la unua reago, veninta post la apero de ĉi-supra informo en la reto.

Unue, gratulon okaze de la trafa partopreno kaj efiko.

Due, estus utile publikigi freŝajn kaj saĝajn argumentojn kontraŭ Esperanto por pripensi, kiel rebati ilin (aŭ eventuale konsenti; eble eĉ entrepreni ion en la movado por ke iam ili malaperu). Finfine, ĉiu medalo havas du flankojn. Esperanto kaj esperantismo havas ankaŭ minusojn!

Trie, "la" ideologio de Esperanto ne ekzistas, ĉar inter E-parolantoj troveblas du tute malsamaj "frakcioj": pragmatuloj (malplimulto, ĉar la pragmataj ebloj de Eo estas ege limigitaj kaj nekompareblaj kun, ekz., la angla; ilin Eo interesas nur kiel praktika ilo por havi praktikajn avantaĝojn; do, por ili Eo estas nenio pli ol lingvo, kiun ili povas profiti; ne malofte tiaj homoj tute aŭ preskaŭ ne partoprenas E-movadaĵojn) kaj esperantismanoj (por ili Eo estas ne nur lingvo, sed ankaŭ ideo de justeco, egaleco ktp. plus eventuale loko kun bona etoso; okazas, ke tiaspecaj homoj ne ĉiam bone posedas la lingvon mem). Interne de esperantismanoj estas pluraj, se ne multegaj "fluoj". Sed ĉiam ekzistis ia domina vidpunkto. La lasta estas esprimita en la Praga manifesto. Jen dokumento, kiun oni ĉiam konsideru diskutante pri Eo.

Kvare, necesegus vere KUNlabori en diversaj projektoj de la priskribita "forumo". Por komenco indus anonci iliajn planojn en la diskutlisto kaj pensi, kion ni povus kontribui.

Kvine, kompreneble, ĉio dirita estas mia persona opinio, kiun mi al neniu altrudas, sed volonte pridiskutus.

"Olda SEJMulo" Aleksandr Melnikov (Rostov-na-Donu)

REJM-MEMBROJ POR 2004

Burkina Oksana, Deljcov Jevgenij, Grigorjevskaja Oljga , Hekland Bård, Ĥaritonova Nadeĵda, Ĥlizov Konstantin, Ivanov Slavik, Koltunov Valerij, Kostina Jelena, Kudrjaŝova Alla, Kuznecov Aleksej, Lisina Anna, Maciboruk Anna, Malenko Vitalij, Maslova Jelena, Melnikova Jelena, Obrazcov Konstantin, Penjkov Andrej, Serdjuk Aleksej, Sudakova Aleksandra, Terjoĥina Marija, Tureckij Sergej, Sidorova Valentina, Viĥrov Konstantin

Patronoj: *Arbekova Katerina, Kokolija Georgij, Povorin Miĥail*

Eksciu, ke...

EN ĈEBOKSARI ESTIS ERA

De la 31-a de januaro ĝis la 1-a de februaro en la urbo Ĉeboksari okazis ERA – Esperantista Regiona Aranĝo. La temo de la renkontiĝo estis diversspecaj festivaloj: lingvaj, hobiaj, nacikulturaj. Dum 3 tagoj estis organizitaj vespero de ĉuvaŝa kulturo, rolludo "Lingva Festivalo", vespero de hobioj, diskuto pri IJK (dum kiu estis ellaborita imago pri Festivalo de kulturoj – unu el planataj IJK-aranĝoj). Certe, paŭzoj kaj vesperoj estis plenigitaj per gajaj ludoj. Tradiciaj E-kursoj kunigis homojn por kompili teman vortaron de moderna studento kaj esplori eblecon krei eseojn uzante nur adverbojn, adjektivojn aŭ verbojn.

En ERA partoprenis 29 personoj, ĉefe el Ĉeboksari kaj Novoĉeboksarsk, inter ili estis 6 gastoj: el Moskvo – Garik Kokolija, Britta Loose, el Kazanj – Vladimir Degtjarev, Damir Ĥalilov, el Svedio – Katja Ignatjeva kaj Sjoerd Bosga. La ĉefa organizanto de la aranĝo estis juna klubo "Edmond Privat", kaj ĝiaj membroj tiel ekhavis la unuan sperton pri organizado. Estis ankaŭ minusoj: la plej grava – malgranda kvanto de aliurbanoj, tio okazis pro tre malfrua informado pri ERA (la klubanoj decidis pri la aranĝo tuj post la Novjaro).

ankaŭ la dancoj diferencas en diversaj regionoj

Aleksandra Fedotova, oficisto de Ĉeboksara Esperanto-centro

NOVAĴOJ EL LITOVIO

En la 6-a pasintjara numero de prestiĝa dumonata revuo "Formatas", destinita por eldonistoj, presistoj, reklamistoj k.s., aperis longa dupaĝa intervjuo de literatura redaktoro de ĉi revuo verkisto Laimonas Inis kun la prezidanto de Litova Esperanto-Asocio Povilas Jegorovas "Konstruantoj de Babelturo". Temas pri agado de litovaj esperantistoj ĝenerale, rilatoj de L.Zamenhof kun Litovio, lastatempa aktiviĝinta eldonado en kaj pri Esperanto en Litovio, prepariĝo al UK en 2005 en Vilnius k.s. La publikaĵo estas bele ilustrita. Kvarono de la 76-paĝa revuo estas dediĉita al literaturaj kaj ĝenerale kulturaj aferoj. Ĝi estas vendata en librovendejoj.

La 23-an de decembro 2003 en Vilnius finiĝis dumonata senpaga elementa Es-

peranto-kurso, kiun gvidis germana esperantisto, nun loĝanta en Vilnius, Frank Wurft. La kurso komenciĝis la 14-an de oktobro, lecionoj okazis en prestiĝa Vilniusa gimnazio de Salomeja Neris unufoje semajne. La kurson finis 20 personoj, kvankam komencis ĉirkaŭ 50. Ĝin organizis Vilniusa filio de Litova Esperanto-Asocio. Finintoj de la kurso ricevis diplomojn la 22-an de januaro dum kunveno de Vilniusaj esperantistoj en biblioteko de Kalvarijos. Samtempe komenciĝis nova Esperanto-kurso en Vilnius, kiu daŭros ĝis la 30-a de marto.

Ekde mezo de novembro 2003 funkcias grave renovigita retejo de Litova Esperanto-Asocio <www.esperanto.lt>. Ĝi enhavas multajn rubrikojn kiel: Kio estas Esperanto? (en litova lingvo), Koncize pri Litovio (kaj pri Vilnius), Asocio, Organizoj, Membriĝo, Revuo "Litova Stelo", Libroservo, Junulara sekcio, Utilaj ligoj, Esperanto-litova vortaro, UK Vilnius 2005. Sur la frontpaĝo oni trovas ankaŭ aliajn rubrikojn kiel: Anoncoj, Novaĵoj, Aranĝoj, Dokumentoj, Aktuale pri UK en 2005, Fotoalbumo, Libere skribu, Korespondi deziras. Ne ĉiuj rubrikoj dume plene funkcias, sed konstante la enhavo de la retejo ampleksiĝas kaj estas regule renovigata. Parto de materialo estas en litova lingvo, sed ĉefe la retejo estas en Esperanto. Ĝin prizorgas korea esperantisto, loĝanta en Vilnius, Ĉoe Taesok. Bonvole vizitu la retejon, informiĝu pri aktualaĵoj, faru proponojn al prizorganto de la retejo pri ĝia plibonigo k.s.

La 22-an de novembro 2003 Vilniusa junulara Esperanto-klubo "Juneco" organizis tradician tablotenisan konkuron, kiun partoprenis junuloj ankaŭ de aliaj litoviaj urboj. Krom sporta programo partoprenantoj de la aranĝo vizitis la parlamentejon, ekskursis al keloj de Vilniusa Katedralo k.s.

La 22-an de decembro 2003 okazis ĝenerala jarkunveno de Vilniusa junulara Esperanto-klubo "Juneco". Kiel prezidantino por la sekva jaro estis reelektita Jolanta Dudenaite, kiel vicprezidantino estis reelektita Olga Strojeva. Poste ĉiuj kune festis Kristnaskon.

La 23-an de januaro en Vilnius okazis kunsido de la ŝtata komisiono pri eldonado de poŝtmarkoj kaj aliaj filatelaĵoj, gvidata de la Sekretario de la ministerio pri komunikado s-ro Valdemaras Salauskas. Krom aliaj aferoj ĝi traktis ankaŭ skriban proponon de Litova Esperanto-Asocio pri eldono de poŝtmarkoj kaj aliaj filatelaĵoj lige kun la venonta UK en Vilnius en 2005. La decido de la komisiono estis enigi proponon de Litova Esperanto-Asocio en eldonplanon de filatelaĵoj por 2005. Litova Esperanto-Asocio proponis produkti ne nur poŝtmarkon pri UK en Vilnius, sed ankaŭ multajn aliajn filatelaĵojn (ekz. kolekton de poŝtmarkoj, specialan koverton, specialan poŝtkarton, specialan aerogramon, stampilojn de la unua tago k.a.). Definitiva decido pri la konkreta kvanto de filatelaĵoj, eldonotaj lige kun UK en 2005, estos akceptita fine de marto ĉi-jare. Necesas atentigi, ke en Litovio kutime estas eldonataj nur 25 novaj poŝtmarkoj jare.

(landa-agado)

INFORMILO № 1

pri la 40-aj jubileaj Baltiaj Esperanto-Tagoj (BET-40)

Litova Esperanto-Asocio invitas Vin partopreni la vicajn ĉiujarajn somerajn jubileajn tradiciajn 40-ajn Baltiajn Esperanto-Tagojn (BET-40).

CELOJ kaj TASKOJ: studi problemojn de Esperanto-movado, elstarigi nuntempajn ĉefajn taskojn de Esperanto-agado, interŝanĝi sperton pri esperantista laboro, perfektiĝi en Esperanto, enhavoriĉe pasigi la tempon.

LOKO: BET-40 okazos en malgranda urbeto Birŝtonas, kiu situas 40 kilometrojn for de Kaŭnas kaj 90 kilometrojn for de Vilnius apud la ĉefa rivero de Litovio Nemunas. La urbeto estas en suda parto de Litovio, situas en centro de regiona nacia parko, ĉirkaŭita de belegaj pinarbaroj. Birŝtonas estas fama kuracloko de Litovio. Ĉefa lokalo de BET-40 estos la sanatorio "VERSME". La urbo kaj la sanatorio estas ideala loko por laboro kaj ripozo. La loko estas atingebla buse kaj aŭtomobile. Kontraŭ aparta pago eblos uzi diversajn kuracajn kaj sanigajn procedurojn de la sanatorio, naĝejon, saŭnon, sportan salonon. Eblos rajdi per ĉevaloj, veturi per ĉaro, lui biciklojn, boatojn k.s.

TEMPO: BET-40 funkcios la 10-18-an de julio 2004. Veni al la aranĝo eblas jam la 9-an de julio.

PARTOPRENO: ni invitas ĉiujn esperantistojn. Speciale ni dezirus vidi esperantistojn el la landoj ĉirkaŭ Balta maro, sed ankaŭ de ĉiuj aliaj najbaraj kaj pli foraj landoj. La kvanto de partoprenantoj ne estas limigita.

ANTAŬ BET-40 la 3-10-an de julio en Litovia apudmara urbo Kretinga okazos la vica 57-a kongreso de IKUE. Do, ĉiuj partoprenontoj de tiu ĉi kongreso ankaŭ estas invitataj al BET-40 kaj povas uzi tiun ĉi aranĝon kiel postkongreson.

ALIĜKOTIZO por esperantistoj el ekssovetiaj landoj estas 40 lidoj. Infanoj kaj gejunuloj ĝis 16-jaraj la aliĝkotizon ne pagas. Lernejanoj kaj studentoj pagas duonon de la baza kotizo (20 lidoj). Pageblas en ajna konvertebla valuto. Unu eŭro egalas 3,45 lidojn, la kurzo estas konstanta kaj ne ŝanĝiĝas.

ALIĜO: por aliĝi necesas plenigi aliĝilon kaj sendi ĝin al Litova Esperanto-Asocio: p/k 167, LT-44287 Kaunas, Litovio. Eblas aliĝi telefakse 370-37-228616, rete <litova.ea@mail.lt>. Samtempe pagu la aliĝkotizon. Aliĝiloj riceveblas ĉe LEA.

PAGEBLOJ : 1) sendi poŝte al Litova Esperanto-Asocio (al ties sekretariino Aida Cizikaite); 2) ĝiri al la konto de Litova Esperanto-Asocio litv-s ĉe UEA; 3) pagi per kontanta mono en Oficejo de LEA en Kaunas, str. L.Zamenhofo 5, aŭ en ties filio en Vilnius, Gedimino av. 19 (eniro de Nacia Operejo, ĉambro 122 sur la teretaĝo); 4) esceptokaze konsente de OK pagi surloke ĉe veno al la aranĝo, se ne eblas anticipa pago. La aliĝkotizo ne estas repagebla. Aliĝo sen pago de la kotizo ne validas (krom speciale interkonsentitaj kazoj).

LOĜADO: ekzistas kelkaj loĝofertoj: 1) en dulitaj ĉambroj de la sanatorio "VERSME" (duŝejo kaj necesejo por ĉiu ĉambro), unu nokto por unu persono kostas 40 lidojn; 2) en unulitaj ĉambroj de la sanatorio "VERSME" (krome estas televidilo kaj fridujo), unu nokto kostas 70 lidojn; 3) en luksaj apartamentoj el du ĉambroj de la sanatorio "VERSME" por unu persono, unu nokto kostas 110 lidojn;

4) en luksaj apartamentoj el du ĉambroj de la sanatorio "VERSME" por du personoj, unu nokto por unu persono kostas 70 lidojn (la tuta apartamento – 140 lidojn); 5) en luksaj apartamentoj el du ĉambroj de la sanatorio "VERSME" por tri personoj, unu nokto por unu persono kostas 55 lidojn (la tuta apartamento – 160 lidojn); 6) en dulitaj ĉambroj de aliaj sanatorioj; unu nokto por unu persono kostas 40 lidojn; 7) en du- kaj trilitaj ĉambroj de sportista komunloĝejo (duŝejo kaj necesejo en koridoro); unu nokto por unu persono kostas 20 lidojn; 8) eblas mendi ĉambrojn en urbaj hoteloj, la prezoj varias de 40 ĝis 150 lidoj por unu persono. Litova Esperanto-Asocio esperas havi signifan subtenon de kelkaj fontoj por la aranĝo, tial efektive loĝado por aliĝontoj en la kategorioj A, B, C kostos grave malpli. Pagu same kiel la aliĝkotizon, dezirinde laŭeble pli frue, esceptokaze eblas pagi ankaŭ surloke.

MANĜADO: en manĝejo de la sanatorio "VERSME" organizite. Tri manĝoj tage. Eblos organizi vegetaran manĝadon. Unutaga trifoja manĝado kostos 35 lidojn (ĉirkaŭ 10 eŭrojn). Pro eventuala subvencio manĝado por esperantistoj de la aliĝkategorioj A, B, C, plej verŝajne, kostos multe malpli. Pagu same kiel la aliĝkotizon, laŭeble pli frue, esceptokaze eblos pagi ankaŭ surloke dum la registrado.



La 2-an de februaro 2004 forpasis elstara estona esperantisto, aŭtoro de pluraj lernolibroj kaj vortaroj, honora membro de UEA, Jaan Ojalo (1914-2004). ***(esperanto-rus-informoj)***

GRAVE: Esperantistoj, kiuj grave kontribuos al la programo de la aranĝo aŭ/kaj signife helpos organize, pro loĝado kaj manĝado ne pagos.

PROGRAMO: tradicia, t.e. somera universitato, paroligaj kaj perfektigaj kursoj, literaturaj aranĝoj, muzikaj kaj artaj vesperoj, eventuale pupteatra spektaklo, debatoj pri situacio kaj problemoj de Esperanto-movado en Baltiaj landoj, tradukista kurso, pedagogia seminario, seminario de klubestroj kaj aktivuloj, movada lernejo, sciencteknikaj kaj fakaj aranĝoj, instruado de kantoj, junularaj aranĝoj, konkursoj, kvizoj, distraj programeroj, ekskursoj al Kaŭnas kaj aliaj apudaj vidindaĵoj, ripozado en naturo, diskutoj, forumoj, libroservo, interkona vespero, baza

konatiĝo kun la litovaj lingvo kaj kulturo, ekspozicioj, filmoj kaj lumbildoj, gazetara konferenco, sportaj ludoj, oficiala malfermo kaj fermo, adiaŭa vespero. Enkadre de BET-40 okazos vica Balta Esperanto-Forumo. Organiza komitato atendas proponojn, sugestojn, ofertojn por la programo, ankaŭ sinproponojn.

VIZOJ: al Litovio senvize rajtas veni civitanoj de multaj landoj. Aliaj vizojn havigu en Litoviaj ambasadejoj kaj konsulejoj en diversaj landoj. En problemaj kazoj turnu Vin por helpo al Litova Esperanto-Asocio. Se necese, LEA povas sendi oficialan inviton.

ALIAJ GRAVAĴOJ: Komence de junio 2004 ĉiu aliĝinto ricevos Informilon № 2 kun pli detalaj kaj aktualaj informoj pri BET. Ni antaŭvidas eldonon de ĉiutaga gazeto dum la tuta periodo de la aranĝo.

ALIĜ-KONTAKTADRESO: p.k. 167, LT-44287 Kaunas, Litovio, Litova Esperanto-Asocio. Stratadreso de LEA estas: str. L.Zamenhofo 5, LT-44287 Kaunas, Litovio. Telefono de LEA estas 370-37-208503 (landa kodo, urba kodo, numero). Telefakso estas: 370-37-228616. Retadreso de LEA estas <litova.ea@mail.lt>.

BONVENON AL LITOVIO!

Organiza komitato

<ESPERANTO-KURSO> REFREŜIĜIS

La tutlande fama retpoŝta kursejo <esperanto-kurso> daŭre funkcias, senpage instruante al pluraj dekoj da ruslingvaj retanoj per la klasika 20-leciona lernolibro de Boris Kolker. Nun en la kursejo estas pli ol 300 lernantoj el plej diversaj lokoj. Estas aparta honoro por ĉiuj lernejanoj – instruantoj kaj instruatoj – ke la lernejon ofte vizitas la verkinto mem de la kurso. Boris Grigorjeviĉ ankaŭ partoprenis adapton de la kurso por reta uzo.

Dum la lasta jaro en <esperanto-kurso> aperis novaj aktivuloj, dank' al kiuj la malnova kerno de instruistoj sukcesas kontroli ĉiujn taskojn ĝustatempe. Speciale menciindas Maksim Griŝin, presisto el Moskvo, kiu faras eble duonon de la tuta instruista laboro. Renoviĝis plene ankaŭ la paĝaro, kiu rakontas pri la lernogrupo en Interreto <www.ikso.net/esperanto-kurso/>, nun pri ĝi zorgas juna REJM-aktivulo el Belorusio Igor Safonov.

Kun la drasta renovigo de <esperanto-kurso> ruslingva instruado de Esperanto per la reto iĝas la plej amasa instrumaniero en nia lando (aŭ, pli precize, en pli vasta Ruslingvio). Interesiĝantoj pri la Internacia Lingvo povas nun elekti inter la multmedia kurso ĉe <www.lernu.net> (kiu estas pli bela kaj multefaceta, sed postulas pli da ret-konekto) kaj la klasika instruado en <esperanto-kurso> (por kiu sufiĉas havi nur retpoŝton). Ekzistas lernantoj, kiuj speciale venas al poŝt-oficejo por lui komputilon por duonhoro kaj sendi siajn plenumitajn taskojn por la kontrolado.

Interreto en Rusio plu kreskas, kreskas ankaŭ la ebloj instrui kaj uzi la Internacian Lingvon en la Internacia Reto.

Slavik Ivanov (Peterburg)

KARNAVALA LETERVESPERO

La 21-an de decembro en Kostroma sukcese pasis letervespero "KARNAVALA, NACIA KOSTUMO DE TUTA MONDO, iliaj specialecoj kaj diferencoj". La vespero pasis en Kostroma biblioteko nome de N.K.Krupskaja kunlabore kun ties fako de fremdlingva literaturo kaj Kostroma Regiona Unio de Rusiaj Germanoj. Partoprenis ĝin ĉ. 30 gejunuloj. Leteroj venis el Brazilo, Kongo, Italio, Anglio, Francio, Svedio, Germanio, Pollando, Hungario kaj Rusio. Inter sendaĵoj estis belegaj fotoj, interesaj rakontoj, gazetaj artikoloj, eĉ KD kun karnavala muziko el Kongo! Kostroma E-Teamo elkore dankas ĉiujn sendintojn! Nun ĉiu deziranto povas konatiĝi kun la materialoj enkadre de publika ekzpozicio en la biblioteko.

(esperanto-rus-informoj)

INVITO AL LA 56-A KONGRESO DE IFEF

Sopron, Hungario; de la 8-a ĝis la 15-a de majo 2004

La Hungara Fervojista Esperanto-Asocio (HFEA) kaj la Aŭstria Fervojista Esperanto-Federacio (AFEF) – Sekcioj de la Internacia Fervojista Esperanto-Federacio (IFEF) komune aranĝos la 56-an Internacian Fervojistan Kongreson en la urbo Sopron, situanta en la okcidenta angulo de Hungario. Tiu estos la kvina IFEF-Kongreso en Hungario, sed la unua komune aranĝota en la historio de IFEF. Kaj Hungario kaj Aŭstrio estas famaj pri la bonsukcesaj Universalaj Kongresoj (1929, 1966, 1983 – en Hungario, 1924, 1936, 1970, 1992 – en Aŭstrio) kaj tiuj de IFEF (1962, 1982, 1995, 2000 – en Hungario; 1950, 1959, 1975, 1994 – en Aŭstrio). Entuziasma kaj sperta helpantaro de ambaŭ landoj, bonkvalita kaj komforta hotelo, la mondfama gastamo garantias al Vi agrablan restadon, krome ankaŭ la kongresa urbo kaj ĝia regiono mem kun siaj historiaj monumentoj, artobjektoj, subalpa aero kaj speciala etoso. La kongresa urbo en la jaro 1975 ricevis la distingon "Eŭropo-premio". Ne preteriru la eblecon pasigi la kongresan semajnon en la "juvelo" de Hungario. Kore invitas vin la dunacia LKK je la nomo de la hungaraj kaj aŭstraj fervojistaj esperantistoj.

Virino en sia oficejo rakontas, ke ŝia kromedzo donacis al ŝi oran ringon, sed ŝi ne scias, kiel klarigi al la vera edzo, de kie aperis la ringo. Iuj konsilas:
– Diru, ke via amikino pruntedonis ĝin al vi...
– Ne, malbone, diru, ke oni gratifikis vin kaj vi aĉetis la ringon mem...
Fine iu kolego (viro) diras:
– Diru, ke vi trovis ĝin en buso. Mia edzino, ekzemple, antaŭ kelkaj tagoj trovis en buso oran braceleton... ***(esperanto-anekdotoj)***

Poŝta adreso de la LKK: 56-a kongreso de IFEF, Alfonz MORO, Olga utca 3, HU-7632 PECS, Hungario; retadreso: <ifk56@freemail.hu>. Aliĝilojn vi povas ricevi ankaŭ de: AFEF, poŝtkesto 117, 1103 Wien.

LA RELOJ LIGAS LA LANDOJN, ESPERANTO – LA POPOLOJN

(landa-agado)

REVENINTE EL BELGIO…

La vizitoj al okcidenta Eŭropo jam delonge ne estas unikaĵo por multaj niaj samlandanoj. Des pli tio estas ordinara okazintaĵo por civitanoj de Esperantujo. Nia amata lando etendiĝis sur la tuta terglobo. Ĝi allogas ĉiam kaj en ĉiuj sezonoj. Kaj jen, post la Internacia Festivalo (IF) preskaŭ ĉiuj ĝiaj partoprenantoj forveturis hejmen, sed kelkaj, profitante la okazon, daŭrigis akumuli siajn impresojn. Ankaŭ ni (mi, mia filino Maja kaj Aĥman Junusov) ne preterlasis la eblecon vojaĝi.

Nia celo estis Belgio, iom konata (la unuan fojon mi estis en ĝia franclingva parto antaŭ pli ol 10 jaroj). Ĉi-foje ni direktis nin al la flandra parto de la lando. La loko de nia unusemajna restado – Antverpeno. La unua impreso estas lingvo, kiun oni ne komprenas kaj apenaŭ povas elprononci en ĝi la bezonatajn nomojn. Pro tio plibonis helpo de A.Humet, hispandevena belga esperantisto, kiu afable vizitigis al ni la urbon. Ni vagadis tra mallarĝaj stratetoj de la historia centro, admiris la arkitekturajn multjarcentajn konstruaĵojn kaj… florbedojn kun diverskoloraj penseoj. Foresto de la kutima vintra neĝo tute surprizas: ĉie grizas la nuda trotuaro kaj asfalto.

Kion surmetas belgoj vintre? Multaj estas senĉape kaj en aŭtunaj (printempaj) vestaĵoj! Ankaŭ ŝuoj ne estas solidaj por vintro! Kaj tre oftaj pluvoj. Sed en Rusio tiutempe estis -10… En manĝmaniero de belgoj neordinaras por ni foresto de varmaj pladoj dumtage, sed vespere – plena menuo kun supo.

Nia unusemajna restado en Belgio donis al ni eblon renkontiĝi kun kelkaj lokaj esperantistoj en la sidejo de Flandra E-Ligo (FEL) kaj en iliaj hejmoj, ĝui ilian gastamecon. Tiel ni konatiĝis kun 4-generacia E-familio (familioj Tytgat, De Ketelaere, Jacques, Humet, van Damm), kiu konsistas el personoj diversgrade uzantaj la IL-on: iuj profesie laboras en FEL aŭ instruas Esperanton en lernejo, aliaj estas denaskaj esperantistoj aŭ simple lingvouzantoj. Ĉiuj familianoj estas aktivaj adeptoj de la Internacia Lingvo, partoprenas la agadon kaj la kunvenojn de la loka esperantistaro kaj ankaŭ eksterlandajn E-aranĝojn. La pliaĝa generacio fervore agis en la LKK por sukceso de UK en 1982 en Antverpeno. Ankaŭ ni havis la okazon same, kiel iamaj antverpenaj kongresanoj, viziti sub la gvido de afablaj ĉiĉeronoj Paula kaj Henny la muzeojn pri tipografio kaj pri flandra pentroarto, konata al ni precipe pro P.Rubens kaj A.van Deik.

Impresis la vizito al la sidejo de FEL: kvaretaĝa konstruaĵo enhavas kelkajn la-

borĉambrojn bone ekipitajn, la libroservon, negrandan kuirejon kun bufedo kaj veran presejon, kie oni produktas "La Monaton". Pri simila DOMO ni, rusianoj, povas nur revi… Kaj ankoraŭ unu fakton ni malkovris ĉi-tie: multaj internaciaj E-paroj.

Estas malfacile distingi, kio estis la plej memorinda, la plej interesa, la plej alloga, tamen ne eblas preterlasi kelkvortan priskribon de la vizito al Bruselo. Ankaŭ tie ni estis akompanataj de geesperantistoj. La rekomenciĝanta kelkfoje pluvo (posttagmeze eĉ hajlis forte) ne disponis al longa promeno tra la belga ĉefurbo. Kun helpo de K.Tytgat ni sukcesis konatiĝi kun eldonaĵoj de Eŭropa Parlamento en ĝia sidejo (vere, forestis ajna literaturo en Esperanto), vizitis la Erasmus-Instituton, kie estas instruataj multaj fremdaj lingvoj. Tage ĉe manĝa tablo kolektiĝis multnacia kompanio, kiu parolis en diversaj lingvoj, sed por ni ĉefis – la nia: ni havis renkontiĝon kun Dafydd ap Fergus, kiun la internacia ĵurio proklamis "La Esperantisto de la Jaro 2003" pro la aktiva kaj grava informa laboro en Brusela Komunikad-Centro. A.Junusov prezentis en intervjuo al D.ap Fergus sian opinion pri homaj rajtoj en Kaŭkazio kaj prezentis al ĉiuj kunvenintoj la gazeton "Dagestanskij rakurs", kies ĉefredaktoro li estas. Sur ĝiaj paĝoj regule aperas publikaĵoj pri Esperanto.

> Pastro kritikas preĝejan pentriston:
> ○ Filo mia, kie vi vidis anĝelojn en ŝuoj?
> ○ Sed kie Vi, pastra moŝto, vidis anĝelojn sen ŝuoj?

Ne eblas priskribi ĉion interesan, kion ni spertis. Do, veturu ankaŭ vi kaj malkovru "vian" Belgion!

Tatjana Loskutova (Ivanovo)

En la pasinta numero de REGo estis du eraraj informoj. Mi, kiel la kulpinto, pardonpetas kaj korektas la erarojn. En la paĝo 9 aperis la foto ne de Saŝa Osokin, kiel estas indikite, sed de Vjaĉeslav Boŝĉenko. En la paĝo 10 estas erare indikita la loĝloko de Andrej Grigorjevskij, devas esti *"Ŝumerlja, Ĉuvaŝio"*. ***(Garik Kokolija)***

ESPERANTA PEN KANDIDATIGAS WILLIAM AULD POR NOBEL-PREMIO

Jam la okan jaron sinsekve la Esperanto-literaturo sukcesas proponi propran, nekontesteblan kandidaton al la Nobel-premio: temas pri William Auld, baldaŭ 80-jara. La signifo de tiu propono estas duobla: unuflanke Esperantio kapablas rekomendi kandidaton, aliflanke ekzistas unuanimeco inter la diversaj skoloj pri la nomo de tiu kandidato. La nomon fakte proponas ne nur la Esperanta PEN (kiun Auld prezidis), sed ankaŭ EVA kaj aliaj. Sendepende de la rezulto, la nomitaj kapablo kaj konverĝo estas jam rimarkinda sukceso. William Auld estas interalie la aŭtoro de la plej grava poezia ĉefverko post la dua mondmilito: "La infana raso". Al la ampleksa originala produktado aldoniĝas la tradukoj, kaj ankaŭ brilaj atingoj kiel didaktikulo: ekzemple lia krestomatio "Paŝoj al plena posedo" (ĉe LF-koop) bonege rezistas al la tempo, kvankam jam 35-jara. Auld vivas en skota vilaĝo, relative proksima al Edinburgo, kun sia edzino Meta kaj la familioj de ambaŭ gefiloj. Lia samaĝa poetofrato John Francis ankaŭ loĝas en Skotlando.

(HeKo)

LIRO-2003

La 06-an de decembro 2003 kadre de la Zamenhofa Semajnfino en Kaliningrado estis anoncita la rezulto de la tradicia literatura konkurso Liro-2003, organizita de "La Ondo de Esperanto".

La juĝkomisiono (Aleksej Birjulin, Sten Johansson, Wolfgang Kirschstein, Aleksander Korĵenkov, Alen Kris, Valentin Melnikov) ricevis 48 konkursaĵojn de 22 personoj el 12 landoj: Brazilo, Britio, Finnlando, Francio, Germanio, Luksemburgio, Norvegio, Pollando, Ruslando, Svedio, Ukrainio, Usono.

La rezulto de Liro-2003

Originala prozo. Laŭreato: **Paul Gubbins** (Britio) pro "En Vermonto". Laŭda mencio: Lena Karpunina (Germanio) pro "Tiu tago".

Originala poezio. Laŭreato: **Jean-Marie Ries** (Luksemburgio) pro "La juĝantinaro". Laŭdaj mencioj: Ljudmila Orajevskaja (Ukrainio) pro "Acero"; Bernadete Asensi Tavares de Melo (Brazilo) pro "Makuloj".

Traduka poezio el la rusa: poemoj de Fjodor Tjutĉev. Laŭreato: **Jurij Karcev** (Ruslando) pro "Silentium!". Laŭda mencio: Tatjana Auderskaja (Ukrainio) pro "Silentium!".

Traduka prozo el la rusa: Антон Чехов “Человек в футляре”. Laŭreato: **Anna kaj Mati Pentus** (Ruslando). Laŭda mencio: Jukka Pietilainen (Finnlando).

Traduka prozo el la angla: Mark Twain “The Celebrated Jumping Frog of Calavares County”. Laŭreato: **Michael Ansaldi** (Usono). Laŭda mencio: Maurice Wittenberg (Usono).

Ĉiu laŭreato ricevos diplomon kaj librodonacon. Konforme al la regularo de Liro, la organizantoj rezervas al si la rajton ĝis la 31-a de decembro 2005 publikigi la ricevitajn konkursaĵojn en “La Ondo de Esperanto”, libroforme kaj elektronike.

Gratulon al la laŭreatoj! Dankon al la partoprenintoj!

Halina Gorecka, sekretario de Liro-2003

LUDMILA JEVSEJEVA

En la pasinta numero de REGo aperis materialo, dediĉita al la 100-jara jubileo de Ludmila Jevsejeva. Bedaŭrinde REGo ne sukcesis tiam aperigi foton de la poetino. Nun ni publikigas la foton kaj, uzante la okazon, prezentas ankoraŭ unu versaĵon de Ludmila Jevsejeva, publikigitan en Esperanta Antologio.

ESTU TIEL

Sur mian bruston kapon metu.
En dolĉe proksimiga poz’,
Silentu iom, ne ripetu
La vortojn de banala proz’.

Ne ĵuru vane, ne promesu,
Mi torĉe ne ekflamos plu.
Pasiaj manoj ne karesu
Min ĝis matena freŝa blu’.

Se mi foriras – estu tiel!
Al ĉio venas lasta foj’.
Mi, elĉerpita, velkas kiel
Petaloj blankaj de levkoj’.

NOVA VERSAĴO

de Mikaelo Bronŝtejn

TOMBO DE HAMLETO

Trans onda akvogrizo,
tra spaco grizkolora
mirakle, morne ŝvebas
kastelo Elsinora,
kaj portas pramŝipeto
kun pigre lula lanto

por alkoholaĉeto
la svedojn al Danlando.

Sed flanken de l' butikoj
strateto streta gvidas.
El historia grizo
sekreton ĝi konfidas,
al tiu amaseto,
paŝanta sen aplombo
ĝis la fortikaj turoj,
ĝis la malplena tombo.

Ĉe la vespera pento,
aŭ ĉe l' matena preĝo
ĉu iu rememoras
pri la reala reĝo,
pri la regant' bonkora,
l' epok' sen aventuroj?
En ondoj de l' jarcentoj
degelis ties spuroj.

Sed ĵuras du turistoj,
la timigita paro,
ke en krepusk' renkontis
la ombron de la Patro,
ankaŭ aliaj povas
fidinde rememori,
ke aŭdis en la korto
suspiran "Poor Yorick!.."

Ofelia en blanko,
klarsona sabra tinto –
ĉu estas aŭ ne estas
fikcio de l' estinto?
Plu vivas historio
en la eterna miro
pri l' tempo tragedia,
kreita de Ŝekspiro.

"Ĉu esti aŭ ne esti?" –
sen fidi iluzion
apud malplena tombo
ankaŭ mi aŭdis tion!
Kaj en ravita aro
kun freŝa florbukedo
mi klinas la genuojn
ĉe l' tombo de Hamleto.

09.01.2004, Helsingør

TRADUKKOLEKTO DE MIKAELO POVORIN

Saluton, karaj legantoj! Multaj el vi aŭdis miajn originalajn kantojn. Tamen ĉi-foje mi decidis prezenti miajn tradukojn. Des pli ke tio lastfoje estis publikigita kaj/aŭ kantita antaŭ sufiĉe longe.

Tradukado, same kiel verkado, estas por mi enigma afero. Oni ofte ripetas, ke por kreado necesas nur 10 procentoj da kapabloj, kaj la ceteraj 90 procentoj estas streĉa laboro. Ofte estas tiel, sed ne ĉiam. Iufoje mi povas dum du horoj verki kanton laŭ mendo, eĉ ne volonte, konscie elvokinte en mi inspiron. Alifoje "ne venas inspir' kun persist" ("Kanto pri nenio"), kaj la kanto restas nefinita dum tagoj, monatoj, jaroj, eble eĉ neniam finote. Triafoje mi sukcesas post longa sinturmentado fini ĝin, sed la rezulto tute ne kontentigas min, mi neniam plenumas la kanton publike, kaj ĝi iĝas forgesita. Kvarafoje la inspiro venas mem tute neatendite. Okazas, ke mi aŭdas bonegan melodion en sonĝo (mi ĝenerale sufiĉe ofte sonĝas nur aŭde, sed ne vide). Sed vekiĝante, ho ve, mi tute nenion povas rememori…

"Amikoj nin forlasas" estas, laŭ mi, unu el la plej bonaj kantoj de unu el la plej famaj rusiaj bardoj. Same pri "Glafira". Eble pli-malpli konata estas "Dediĉe al bovino". Laŭ mia memoro, mi tradukis tiujn kantojn sufiĉe rapide. Certe en tiu tavolo de muziko ekzistas multe da ne malpli bonaj kantoj. Tamen ial mi ĝis nun ne tradukis ilin. La ceteraj estas, se diri milde, ne tre konataj. "Fiŝkaptiston" mia amiko Aleksej Pletnjov kantadis "pam-pa-ram", poste klarigadis, ĉiam praktike samvorte, pri kio devas temi en la kanto. Do, ĉi-kaze formale eblas diri, ke mi verse tradukis prozan originalon (ne tuj kaj eĉ kun helpo de Valentin Melnikov en la tria strofo). "Ne unuas vi en mia kor'" iam estis en la repertuaro de Maŝa Rasputina. La originalo estas iom malfacile tradukebla, ĉar la akcento ofte estas ĉe la tria silabo de la fino. Eble subkonscie mi volis iom eksperimenti, provi miajn fortojn. "Alvenu" verkis ruse Amalia Aroloviĉ, denaska esperantistino. Mi legis ĝin kaj tuj komprenis: jen bona trovaĵo. Restas nur traduki (cetere, ankaŭ komponi muzikon).

Do, konklude, kial mi tradukis ĝuste ĉiujn ĉi kantojn? Mi ne scias centprocente. Eble en la tago, kiam mi okupiĝis pri ili, la matenmanĝo estis aparte bongusta. Eble la vetero estis aparte bona. Eble la ĉasado de aŭstraliaj aborigenoj estis aparte sukcesa. Eble… Mi ne scias. Tamen ĝuste tiuj kantoj inspiris min, sekve, ili estas sufiĉe bonaj. Jen, juĝu vi mem.

Miĥail Povorin (Moskvo)

ALVENU

muziko de M.Povorin, vortoj de A.Aroloviĉ, traduko de M.Povorin

Alvenu en aŭtunaŭroro,
Dum vipas la fenestron pluv',
Dum la anima amlangvoro.
Nu, kial vi hezitas plu?

Alvenu, kiam vintro fridas
Kaj ĉion kovras neĝa mol'.
Mi tage-nokte hejme sidas,
Atendas, atendas vin en trista sol'.

Alvenu, kiam primavero
Torente rojas en la strat'.
En la memor' sen efemero
Min gardu, kara atendat'.

Alvenu vi somerkulmine
En florabundo kaj arom'.
Pripensu: tempas jam finfine,
Ke homon, ke homon ie trovu hom'.

Alvenu en lontana sonĝo,
Flugvenu per leĝera glis'.
Min savu de la mava sorĉo
Per via dolĉa arda kis'.

Alvenu tute ajnan horon
Kaj falu al la flama sin'.
Alvenu, ŝiru mian koron
Kaj ne forlasu, tutvive ne forlasu min!

AMIKOJ NIN FORLASAS

muziko kaj vortoj de V.Jegorov, traduko de M.Povorin

Amikoj nin forlasas sen avert',
Kaj kovras neĝ' la paĝojn de l' memoro.
Ni ridas kun amika nova ĥoro,
Sed nokte rememoras pri la perd',
Sed nokte rememoras pri la perd'.

En sonĝo ilin febre vokas ni,
Asfalton tretas, junaj kaj elastaj,
Kaj ili ĵuras per manpremoj lastaj,
Ke ree kunos nia kompani',
Ke ree kunos nia kompani'.

Ili degelas en la blua pal',
Kaj ni en sonĝ' al ili tiel fidas,
Sed en real' la pordoj malfermitas,
Kaj la doloro estas en real',
La brulodoro estas en real'.

Sed ne ŝireblas inter ni faden',
En mi ĝi tremas, cedi ĝi ne volas.
Amikoj foras, kiu nin konsolas?
Amikoj nin forlasas sen reven',
Amikoj nin forlasas sen reven'.

Amikoj nin forlasas sen avert',
Kaj kovras neĝ' la paĝojn de l' memoro.
Ni ridas kun amika nova ĥoro,
Sed nokte rememoras pri la perd',
Sed nokte rememoras pri la perd'.

DEDIĈE AL BOVINO

muziko kaj vortoj de A.Makareviĉ, traduko de M.Povorin

Kiu al mi diros per vort' aŭ skribo:
Kial tiel tristas la bovina tribo?
Kial ĝi surkampe kuŝas, enuas?
Kial ĝi konstante plore muas?
Sed pro kio ĝoji? Tiom da taskoj:
Kaj melkad' trifoja, kaj idonaskoj.
Manĝo – nure fojno ĝis konstipo,
Kaj pro ĉiu kulp' – dorsobat' per ŝtipo.

Vokas la kampar', sed ne indas fuĝi:
Oni je la kornoj kaptos: "Ne muĝi!"
De la infanaĝ' por la mastro servuto,
Kaj por la anim' kuracilo – knuto.
Kredo pri mirakloj en ĝi murditas,
Amo kaj bonŝanco ĝin evitas.
Eĉ se iu zorgas, nutras kun frando,
Poste ĝin mortigos por viando.

Mi karesis ĝin, per bombono regalis,
Kontraŭ la enigmo terura batalis,
Ke jen ĝi palpebrumas kaj ne scias,
Kun kio mi ĝin pense asocias...

FIŜKAPTISTO

rusa teksto (proza) kaj muziko de A.Pletnjov
E-teksto de M.Povorin kaj V.Melnikov

Sidas hom' ĉe blua lago
Kun kaptil' kaj mezuril'.
Ĝis vesper', kiel papago,
Ripetadas li kun stabil':

Refreno-1:

"Tiu fiŝ' estas du decimetrojn longa.
Mi prenu ĝin, ĉar ĝi taŭgas por sup'."
Tre zorgas li pri bongusta manĝaĵ' estonta.
Do, mezurad' estas grava okup', ege grava okup'.

Nova fiŝ' la hokon tiras.
Certe estos tuj rekord'.
Sed la hom' obstine diras,
Mezurante laŭ sama ord':

Refreno-2:

"Tiu fiŝ' estas tri decimetrojn longa.
Mi lasu ĝin, ĝi tro grandas por manĝ'."
Tre zorgas li pri bongusta manĝaĵ' estonta.
Do, mezurad' estas grava aranĝ', ege grava aranĝ'.

Kiu estas tiu ulo?
Tiel strangas lia ag'!
Rigardante al spegulo,
Vi lin vidas en ĉiu tag'.

Refreno-3:

Tiu fiŝ' estas kvar decimetrojn longa.
Vi lasu ĝin, ĝi tro grandas por frit'.
Tre zorgas vi pri bongusta manĝaĵ' estonta.
Do, mezurad' daŭros ĝis infinit', ĉiam, ĝis infinit'!

GLAFIRA

muziko kaj vortoj de G.Vasiljev, traduko de M.Povorin

Venu vi al mi, Glafira,
Mi tre solas, jen domaĝ'.
Al la viro manĝdezira
Portu pecon de fromaĝ'.
La renkonton kun espero
Ĉe la pord' atendos mi.
Trinku teon dum vespero
Nia para kompani'.

Refreno: Pli bonas sato, ol malsato,
Pli bonas paco, ol koler'.
Pli bonas, ol liber', amato,
Jenas de mia sperto ver'.



Vi al mi, Glafira, venu,
Iam ajn, sen grava cel',
Kaj fromaĝon vi kunprenu,
Sen ĝi teo – bagatel'.
Venu kun kolbaspeceto,
Kaj mi zorgos pri buter'.
Vivo en solec' – vegeto,
Vi konsentu kun sincer'.

Refreno.

Por atend' la fortoj multos,
Nur aperu por moment',
Mi al vi eterne ŝuldos
Kun dankema varma sent'.
Min rigardu vi salute,
Ja ne multon volas mi:
Nur ke sidu dumminute
Kaj teumu kune ni.

Refreno.

NE UNUAS VI EN MIA KOR'

muziko de V.Okorokov, vortoj de L.Derbenjov, traduko de M.Povorin

Vi pri amo ne parolu,
Vanas via ĵur'.
Ambaŭ ni prefere solu
En la viva kur'.
Estas ekster nia povo
Rea voj' al kun'.
Preĝas mi, ke neĝoblovo
Ĉion kovru nun.

Refreno: Iros baldaŭ la somero for,
Kirlos blizardon hasta viv'.
Ne unuas vi en mia kor',
Estas la ĝojo lasta vi.
Iros baldaŭ la somero for,
Blankos surstrate neĝa pur'.
Ne eternos ja por mi angor',
Restos ĝis la printempo nur.

Min sufoku plor' amara,
Senkonsolas mi,
Tamen vin postkuri, kara,
Jam ne volas mi.
Mornu kiel roko peza
Super mi angor'.
Mi pri nova neĝ' forgesa
Preĝas ĝis aŭror'.

Refreno.

LA VINTRA TAGNOKTO

versaĵo de Klara Ilutoviĉ (Elektrostalj)

La mateno

En frua horo tute
Senlumas la mateno.
La nokto nigras mute
En l' adiaŭa spleno.

Ĝi kvazaŭ plu avidas
Reteni la malhelon,
Kaj steloj ne rapidas
Forlasi la ĉielon.

Sed jenas jam la kara
Subita eksereno,
Por ĝojo senkompara
Venkemas la mateno!

La tago

Ĝoje blankas la neĝo
Sub la alta ĉiel',
Kiel virto de preĝo
El magia fabel'.

Kaj la suno etendas,
Dolĉe plena je ĉarm',
La radiojn kaj sendas
Lumridetojn de varm'.

Paŝoj krake sonoras

Laŭ la neĝa suker'.
La ĉiel' rozkoloras,
Kiel bela esper'.

La vespero

L' amikeca kvieto
Etendiĝas konsole.
La malvarma venteto
Neĝon taŭzas petole.

Labortago de l' suno
Al la fino jam glitas.
La blueta neĝduno
Trankviliĝon invitas.

La viola nebulo
Sunradiojn forglutas.
Ĉiu branĉ' kaj okulo
La vesperon salutas.

La nokto

Regas la nokto. En ĉiu neĝero
Vivas enigmo kviete,
Kaj, lumgardante ripozon de l' tero,
Steloj radias ridete.

Gaje scintilas perletoj de steloj
En la plej fora senfino,
Kvazaŭ senzorgaj ludemaj anĝeloj
Ĝojas pri sia destino.

Pentras la frosto ornamojn sen ŝparo,
Sonĝojn kaj revojn kunligas.
Alta malvarmo de l' vintra stelaro
Korojn kaj pensojn varmigas.

METANAGRAMOJ

Por solvi metanagramojn oni devas al ĉiu antaŭa vorto aldoni unu literon kaj poste anagramigi ĝin. Ekz., or' – rok' – kron' ktp. Kompreneble, ni uzas nur radikojn, sen gramatikaj finaĵoj.

1. Komenca litero "N": partiga sufikso – muzika tono – maltago – kompano – artefarita dormigo – natura flavigilo.
2. Komenca litero "L": pli ... – subkapaĵo – genetike identa ĉelaro – arkitektura apogilo.

DIALOGO EN KOSMO

Bv. trovi en la teksto 12 titolojn de Esperantaj libroj.

– Saluton!
– Saluton!
– Kiu vi estas?
– Mi estas Kumeŭaŭa, la filo de la ĝangalo. Kaj vi?
– Ni estas mondcivitanoj. De kie vi venis?
– Mi venis de malproksima planedo Plejo. Ni vivas tie tre feliĉe, sed okazis tragedio en la universo, kaj ni estis devigitaj forlasi nian varman sunan mondon. Eksplodis nia suno, kaj ni, kiuj sukcesis saviĝi, ĉiuj estas dis! En morna vakuo, en la verda raketo, mi solece navigas al aliaj mondoj.
– Ĉu vi konas la Teron?
– Ne, tiu nomo diras al mi nenion. Ĉu estas via patrujo?
– Jes. Tio estas tre juna planedo, kaj tie loĝas la infana raso de homoj. Ili estas tiel "freŝaj", ke ankoraŭ ne havas komunan lingvon, kaj uza, imagu, ĉ. 5000 lingvojn! Nu, mi, feliĉe, komprenas ĉiujn.
– Verŝajne tiu multlingveco estas la tragedo de l' homo?
– Ŝajne, ne. Vere aŭ fantazie, ili vivas senzorge kaj eĉ ne pensas pri tio.
– Nu, tiam ne baldaŭ ili ekiros survoje al universala civilizacio.

Solvoj de la taskoj en REGo № 5-6 (18-19)
METANAGRAMOJ: *1. ok – kot – kort – karot – kartoĉ – aktoraĉ; 2. se – mes – mesi – estim – sentim – tenisem*
TROVANTO: *Ronkas en arbaro amikar'. Mankas tempo, do ploru mono.*

La solvojn necesas sendi dum 2 semajnoj post ricevo de la gazeto al Tatjana Auderskaja poŝte (Ukrainio, 65026 Odessa-26, p/k 71) aŭ rete (<zoo@te.net.ua>, <verda99@mail.ru>).

UTILAJ ADRESOJ

REU: p/k 57, 105318 Moskvo; retadreso <esperanto@au.ru>; ttt-ejo <http://www.reu.ru/>

Libroservo de REU: p/k 4716, 432063 Uljanovsk; retadreso <yuka@vens.ru>; plena katalogo <http://reu.da.ru/rus/katalogo.htm>.

REJM: str.Dugina 17 – 62, 140180 Ĵukovskij, Moskva reg.; retadreso <rejm@euro.ru>; ttt-ejo <www.tejo.org/rejm>.

UEA: Nieuwe Binnenweg 176, NL-3015 BJ Rotterdam, Nederlando; retadreso <uea@uea.org>; ttt-ejo <http://www.uea.org>.

Averto: *tiu ĉi numero de REGo estas la lasta, kiun ricevos ĉiuj abonantoj-2003. La sekva numero estos sendita nur al tiuj, kiuj pagis sian membrokotizon (kun REGo) en REU aŭ REJM por 2004 aŭ la ĉi-jaran REGo-abonkoston.*

Se renkontiĝas bonaj amikoj, gaja etoso estas garantiita; precipe, se renkontiĝas esperantistoj, des pli, se ili renkontiĝas en Ĉeboksari. Vidu en la numero la rakonton pri ERA.

REGo (Rusia Esperanto-Gazeto) *№ 1 (20) februaro 2004*

komuna eldono de REU kaj REJM

redaktas Garik Kokolija *kunredaktas* Viktor Aroloviĉ

poŝta adreso Pjatnickoje ŝosse 45 – 105, 125310 Moskvo, Rusio

retadreso <gazeto@mail.ru>

abontarifoj por 2004:

por loĝantoj de Rusio kaj aliaj landoj de KSŜ – 140 rubloj sendendaj al:

Георгий Владимирович Коколия, Пятницкое шоссе 45 – 105, 125310 Москва

por loĝantoj de aliaj landoj – 15 eŭroj pagendaj al la konto **kklg-r** *ĉe UEA*